



5\*87·122·

# STARTO

ORGANO DE  
ĈEĤA ESPERANTO-ASOCIO





# ZLATNÍK

La kooperativo de art-produktado ZLATNÍK /Orafisto/ produktas orajn, juvelojn, el materialoj liverita, de la klientoj. Venu por elekto al la rica model-kolekto en niaj vendejoj dislokitajn en la distriktoj Ostrava, Opava, Příbram, Místek, Karviná, Nový Jičín, Bruntál kaj Přerov.

Por la bezonoj de vasta publiko ni produktas elektrajn saunajn fornojn kun la povo 6 kaj 9 kilovattoj, kukohorloĝojn, ter-arkojn, faldeblajn turismajn ŝovetilojn, kombil-riketilojn per traktaj kaj fajfilojn por la areo-zono de hundoj. La produktaĵoj ni sendas sendube per poŝto.

KOOPERATIVO DE ART-PRODUKTADO

ZLATNÍK

CS-729-12 Ostrava 1, Zlatnickova ul. 1

VD ZNAK Hradec Králové vykupuje  
tyto druhy peří:

- peří ze zlatého bažanta
- peří z kohouta plymout-  
Ambrox
- peří z perliček
- kohoutí závěsy z krku
- letky z domácí  
kachny
- locasní peří  
z krocana

*Znak Hradec Králové*

**ZNAK**

**VÝROBNÍ DRUŽSTVO**  
Pražská 686 \*\* 501 01  
Hradec Králové



Cena peří se stanoví  
po vstupní kontrole ve  
v.d. ZNAK Hradec Králo-  
vé.

Výkupné zasíláme poštou.  
Peří zašilejte na adresu  
ZNAK, výrobní družstvo  
Pražská 686, 501 01  
HRADEC KRÁLOVÉ



SPOLEHLIVÝ  
SERVIS  
MOTORISTŮM  
POSKYTUJÍ



AUTOOPRAVNÝ  
VÝROBNÍCH  
DRUŽSTEV

# FERVOJISTOJ kongresis

La ŝanĝiĝema printempa vetero kun ofta pluvado dum dua duono de majo ĝenis iomete ankaŭ partoprenantojn de 39-a kongreso de Internacia Fervoĵista Esperanto-Federacio, kiu okazis de la 16-a ĝis la 22-a de majo 1987 en Katowice en Pollando. La kongrean partoprenis 422 delegitoj kaj partoprenantoj el 19 landoj.

La kongreson antaŭis la gazetara konferenco, okazinta vendrede la 15-an de majo. Partoprenis ĝin redaktoroj de kelkaj lokaj kaj landaj redakcioj. Rezulte dum la semajna Fervoĵista Kongreso aperis en kelkaj polaj gazetoj kaj en Pola Radio kaj Televido artikoloj kaj informoj pri nia 39-a IFEF-Kongreso kaj ĝenerale pri Esperanto.

Sabate vespere preskaŭ ĉiuj kongresanoj kolektiĝis en 17-etaĝa sidejo de Silezia Direkcio en centro de la urbo. En amika etoso kaj ĉe dancmuziko renkontiĝadis kaj salutis sin reciproke malnovaj ĝeamikoj kaj interkonatiĝadis novaj amikoj, interparolante, babilante kaj amuziĝante ĝis malfruaj vesperaj horoj.

La solena inaŭguro de la Kongreso okazis dimanche antaŭtagmeze en moderna kaj impona konstruaĵo de la kongresejo, nomata Kulturcentro. Jam frumatene antaŭ la kongresejo muzikis junulara fervoĵista orkestro por saluti alvenantajn partoprenantojn kaj gastojn.

La solenan malfermon de la Kongreso partoprenis ankaŭ multaj oficialaj gastoj, inter ili d-ro Adam Wieladek - vicministro de Trafiko, mgr-o Michal Blaszczyk - vicprezidanto de la urbo Katowice, inĝ. Aleksander Rodak - ĉefdirektoro de Silezia Direkcio, d-ro István Bacskay - reprezentanto de UEA, d-ro Imre Pethes - prezidanto de MEM, d-ro Dragan Nikolić - reprezentanto de FISAIK, mgr-ino Zofia Banet-Fornal - reprezentanto de PEA, mgr-o Włodzimierz Koczur - prezidanto de Sindikato de fervoĵistoj kaj sejmdeputito kaj aliaj.

La prezidanto de IFEF s-ro Joachim Giessner dum solena inaŭguro solene honorigis s-ron Aleksander Rodak per titolo Honora Komitatano de IFEF. Krom tio PEA honorigis la geedzojn Zofia kaj Leszek Wolski per distingilo "Merita Esperantisto". En sia inaŭgura parolado prezidanto de IFEF Joachim Giessner akcentis, ke la ĉi-jara kongreso okazas ĝuste en la centa datreveno de la naskiĝo de Esperanto en la lando, kiu estas ĝia lulilo. Fervoĵistoj per sia laboro ebligas la pacan kunlaboron kaj vastskalan intersanĝon de personoj kaj varoj inter diversaj landoj, la celo de ni esperantistoj estas interkompreniĝo de diversaj popoloj helpe de komuna internacia lingvo. Realligo de tiuj ĉi celoj estas ebla nur kondiĉe de la tutmonda paco, tial la fervoĵistoj-esperantistoj plene subtenas ĉiujn porpacajn ideojn kaj strebojn por konservi la mondpacon. Ankaŭ gastoj kaj reprezentantoj de la partoprenantaj landoj salutis poste la Kongreson.

Post la solena inaŭguro kaj komuna fotografado la kongresanoj denove kolektiĝis en komforta koncerta salonego "L. Zamenhof", kie precize je la 12-a horo komenciĝis la dua parto de la kongresa malfermo, kiun solenis koncerto de la Granda Simfonia Orkestro de Pola Radio kaj Televido en Katowice sub gvidado de Antoni Wicherek. En la programo elsendata de Pola Televido kaj transprenata de Intervizio ni aŭskultis muzikon de Richard Wagner kaj mondfaman solistinon Hanna Lisowska kaj Virinkoruson. La bela muziko kaj arioj prisorĉis la aŭskultantojn.

Posttagmeze dum bela suna vetero gekongresanoj promenadis tra centro de la urbo kaj fine ĉeestis plantigon de la arbeto de amikeco fare de prezidanto de IFEF J. Giessner apud la sidejo de Distrikta Silezia Direkcio.

En la spektakla salonego de Silezia Direkcio PKP ni dimanĉe vespere spektis monodramon "Laboro, sopiro, espero", kiun en internacia lingvo prezentis s-ro Jerzy Fornal, aktoro de la Nacia Teatro en Varsovio.

Poste ni amuzigis kune kun Junulara Teatra Grupo de Fervoja Kulturdomo el Gorzów Wielkopolski. La junaj geaktoroj ĉarmigis la ĉeestantojn, kiu esprimis sian kontenton per tondraj aplaudoj.

Ankaŭ aliaj kongrestagoj estis plenaj de laboraj kaj amuzaj programeroj. Dum du publikaj plenkunsidoj la partoprenantoj interkonatigis kun multflanka agado de IFEF kaj unuanime aprobis la kongresan Rezolucion, kies tekston ni aperigos en la venonta numero. Oni devas menciigi ankaŭ estrarkunvenojn kaj tiujn de diversaj komisionoj, precipe de Fakprelega kaj Terminara. Aliaj kongresanoj ĉeestis mallongan E-kurson laŭ Cseh-metodo, bone gvidata de mgr-ino Maria Czekanska. El la fakaj prelegoj estis la plej interesa tiu merkreda de ing. Janusz Fortunski pri elektrizado de Polaj Ŝtataj Fervojoj kaj pri konstruado de ĉefa Fervoja Magistralo. Preleginto plaĉe ilustris sian paroladon per preskaŭ kvindeko da diapozitivaj, kiuj reliefigis la informojn proksimigante la faktojn kaj lokojn al la atentema aŭskultantaro.

El amuzaj vesperaj programeroj ni menciigi ankaŭ Folkloran Vesperon, dum kiu ni ĉiuj povis ekkoni la belecon de pola folkloro. Kantis kaj dancis fervojaj folklorensembloj. El ili plej varmajn aplaudojn ricevis Reprezenta Pola Fervojistia Folkloro Ensemble "Varmio" el Olsztyn. Tiu ĉi ensemble montris al vere ravitaj esperantistoj el diversaj landoj folkloron de ĉiuj regionoj de Pollando. Riĉeco kaj beleco de polaj naciaj popolaj kostumoj ofte ŝanĝataj dum koncerta programo ege ravigis ĉiujn.

Sed ankaŭ Internacia Bankedo kaj Balo en la plej eleganta restoracio "Centrum-Variete", pliriĉigita per prezentado de diverslandaj geartistoj, multe helpis al gaja kaj amika etoso de la Kongreso. En buntkolora danssalonego ni dancis kaj ĝue amuzigis ĝis la 1-a hero de la sekvonta tago.

Al la programo de la IFEF-kongresoj tradicie apartenas ankaŭ ekskursoj por interkonatigo kun naturbelaj kaj memoraĵoj de la gastiganta lando. Marĉe frumatene per speciala trajno ni forveturis al Krakovo - la antaŭa reĝa ĉefurbo de Pollando. Ĝaŭde tagmeze multaj gekongresanoj veturis per speciala trajno al Oswiecim, kie ni vizitis iaman hitleranan koncentrejon, en 1947 ŝanĝitan al Muzeo de pli ol kvar milionoj da murditaj malliberuloj el 28 nacioj. Okaze de tiu ĉi vizito ni metis florojn apud la Muro de la morto.

Delegacio konsistanta el reprezentantoj de IFEF-Estraro kaj Komitato estis dum la kongresa semajno solene akceptita en Urba Oficejo fare de urbestro de Katowice Jerzy Świrad. La saman delegacion akceptis ankaŭ ing. Aleksander Rodak, Direktoro de Silezia Regiono de Polaj Ŝtataj Fervojoj, kiu kiel esperantisto jam dum tri jaroj aktive partoprenas kongresojn de IFEF kaj tiujn de Polaj Fervojistoj-Esperantistoj kaj subtenas la agadon de la fervojistoj sur la Esperanto-kampo.

Ankaŭ la sabata akcepto de la sama delegacio fare de Ministro

de Trafiko de Pola Popola Respubliko en Varsovio ĝuis grandan inter-  
 reson de ĉiuj invititaj reprezentantoj de IFEF. Ministro de Trafiko  
 PPR Janusz Kaminski krom alia mallonge konigis nin kun la ĉefaj tas-  
 koj de la ministerio kiel gvidorgano de trafiko, en kies konsisto  
 la fervojo estas kaj ankaŭ estonte estos ĝia plej grava parto. Li  
 ankaŭ koncize difinis la ĉefajn celojn kaj evoluon de trafiko en  
 Pollando dum plej proksimaj jaroj. Sed ankaŭ vizito en Fervoja Mu-  
 zeo en Varsovio kaj amika interparolo kun ĝia direktoro pri polaj  
 fervojaj muzeoj kaj skanzenoj, kiel ankaŭ autobusveturo tra Varso-  
 vio kaj pli posta vizito de la nove rekonstruita, belega reĝa kas-  
 telo en Varsovia interesigis ĉiujn. Domage, ke estis tiutage sabato  
 kaj oni ne permesis al ni viziti la tombon de nia kara Majstro d-ro  
 L.L. Zamenhof kaj meti tie florojn.

Ni menciuj ankaŭ, ke la tutan Kongreson partoprenis E-redaktoro  
 de Radio Polonia Andrzej Pettyn. Dank' al tio auskultantoj de Radio  
 Polonia ĉiutage povis auskulti freŝajn informojn pri la Kongreso.

Fine oni povas konkludi, ke kvankam la veteroj ne tro favoris  
 la ĉi-jaran IFEF-Kongreson en Katowice, tamen ni ĉiuj forveturadis  
 el Pollando neĝoje, kun multaj neforgeseblaj impresoj kaj rememoroj.  
 Multaj eĉ kun deziro kaj sopiro aliĝi kaj partopreni ankaŭ la venont-  
 jaran 40-an kongreson de IFEF, kiu okazos en tagoj 4-a ĝis 11-a de  
 junio 1988 en la suna Perpignan en suda Francio.



1

2



1. Kelkaj partoprenantoj de la ekskurso al iama hitlerana koncentrejo  
 en Oświęcim
2. Dum la solena ferno de la Kongreso - la polaj organizantoj transdonas  
 la kongresan flagon al prezidanto de la venontjara LKK Pierre Robiollé  
 el Francio

3

# Internacia Junulara Kongreso

La 43-a Internacia Junulara Kongreso okazis inter la 18-a kaj 24-a de julio 1987 en Krakovo.

La honora protektanto de la kongreso estis la ministro por la junularaj aferoj de Pola Popola Respubliko s-ro Aleksander Kwasniewski. La ĉefa temo de la kongreso estis: Homo kaj civilizaciaj minacoj.

La kongreson partoprenis pli ol 800 geesperantistoj el 47 landoj, i.a. el Togolando, Zambio, Kamerunio, Centrafrika respubliko, Benino, Ghano, Singapuro, Kolombio ktp.

La inaŭguron de la kongreso partoprenis s-ro Wjaslaw Woda, urbestro de Krakovo; Antoni Dragan, prezidanto de Asocio de polaj studentoj; Faysal Almekdad, reprezentanto de Internacia asocio de studentoj en Prago; Ian Jackson, prezidanto de TEJO; Barbara Despiney, reprezentanto de UEA; Modest Blasiak, prezidanto de la Prepar-komitato de la kongreso; Pawel Janowczik, sekretario de PEA k. a.

La kongresanoj povis ĉiutage elekti el la vasta propono de prelegoj, kunsidoj, interesrondoj kaj grupoj, el multaj kulturaj kaj amuzaj programoj. Al la bazaj diskuttemoj apartenis: ekologio, internacia lingva komunikado, historio, nuntempo kaj ties perspektivoj, homo kaj sano, esperanto kaj paco, esperantologio, esperanto kaj kulturo ktp. Grandan atenton vekis prelegoj kiel "La plej dangeraj malsanoj en la historio de la homaro", "Sirmo de la naturo kaj mondo", "La pacaspektoj de la Esperanto-movado", "La lingva problemo en la scienco kaj la rolo de Esperanto". Dum la kongreso okazis seminario per aktivuloj de la Esperanto-movado. Al la plej interesaj prelegoj de la seminario apartenis jenaj: "Zamenhof - homo, tempo, verko", "La junulara Esperanto-movado", "Sociologia karaktero de Esperanto".

La kongresanoj povis partopreni ankaŭ en kulturaj kaj sportaj aranĝoj. Tre riĉa estis la propono de teatraj prezentadoj, ĉu de profesiaj aŭ amatoraj trupoj de diversaj landoj, ĉu de muzikgrupoj kaj kantistoj. Okazis interkona vespero, pola, internacie, danc- kaj muzik-vesperoj kaj adiaŭa vespero. Okazis ankaŭ tuttaga ekskurso.

La 16-an kaj 17-an de julio okazis kolokve de reprezentantoj de TEJO kaj de Internacia asocio de studentoj pri la Internacia komunika kaj informa ordo. Oni proponis arangi kemunan fakan seminarion pri la temo en 1988 en Roterdamo kun partopreno de ankaŭ aliaj organizaĵoj (la laborlingvoj estis Esperanto kaj la angla); en decembro 1987 okazos en Prago plua preparkunveno de la seminario.

Por la periodo 1987 - 1989 estis elektita nova komitato de TEJO, ĉi-foje nur kvinmembra:

Jan Koczmaluk (Pollando)	- prezidanto
Dietrich Weidmann (Svislando)	- sekretario
Claude Rouget (Francio)	- kasisto
Sándor Hideg (Hungario)	- komitatano
Rezső Baross (Hungario)	- komitatano



Nia reprezentantino kaj la ĝisnuna vicprezidanto s-anino Marie Vančurová ne kandidatiĝis plu, sed oni petis ŝin labori plu en la sfero de eksteraj rilatoj de TEJO kun neesperantaj organizaĵoj. Ŝia labortitolo estos "permanenta sekretario por laboro kun internaciaj organizaĵoj". Krome oni proponis ŝin al "honora prezidanto de TEJO".

Kiel 27-a landa organizaĵo de TEJO estis akceptita Kataluna Esperanta Junulara Organizo.

La venonta 44-a Internacia kongreso de TEJO okazos en 1988 en Zagrebo, Jugoslavio. La kongreso en 1989 okazos verŝajne en Svislando aŭ en Nederlando.

(Laŭ raporto de Marie Vančurová)

Sur la kovrilo: Esperanto-solenaĵo en Olomouc. Grupo de partoprenintoj antaŭ akvofontano sur la placo de Paco en Olomouc.

Ĉu vi jam pagis vian membrokotizon  
por la jaro 1988?

## E-klubo en ŠUMPERK

Okaze de jarkunveno la 22-an de januaro k.j. ni resumis nian laboron de la pasinta jaro.

Semajnajn kunvenojn partoprenadas meznombro 10 gesamideanoj.

Niaj membroj partoprenis la renkontigon en Lanškroun kaj Přerov.

Du geklubanoj partoprenis la junularkunvenon en Biesental /GDR/, unu renkontiĝis kun samideanoj en Bulgario, unu en Austrio.

Estis entreprenitaj tri montarekskursoj kaj ses prelegoj kun projekciado de diapozitivoj, kiujn vizitis ankaŭ gastoj.

En la distrika gazeto „Naše slovo“ aperis du artikoloj fare de s-anino Müllerová, kiu ankaŭ prelegis en instruista pensiul-klubo pri Esperanto. Tiuj ĉi lastaj agoj helpis al ni en kolektado de okulvitroj por Ghana; ni kolektis 72 okulvitrojn.

Por la logantoj de Meksikio trafitaj per tertremo donacis la geklubanoj 1000 Kčs.

La tradicion /19-an/ renkontigon apud Esperanto-arbo en banloko Velké Losiny partoprenis 90 personoj. La gesamideanoj el Pardubice alveturis perbuse en la nombro de 40 personoj. La infanoj de EK Interklubo de MKS kontribuis al la programo per kvar belaj programeroj prezentitaj sub la gvidado de san. Rýznarová. Ŝi mem pliricigis la programon per interesa prelego kun diapozitivoj pri Nederlando.

Post la ferioj ni alligis la amikecon kun ER en Bakonszek /Hungario/.

En oktobro estis malfermita la kurso por komencantoj. Aligis 5 personoj. La kurson gvidas san. Štávoová.

En novembro estis organizita ekspozicio direktita je pacmovado, kiun vizitis ĉirkaŭ 900 personoj.

La 18-an de decembro okazis la memorgesperado de 117-a naskiĝdatreveno de L. L. Zamenhof.

Dum la tuta jaro la membroj kolektis entute 313 kg da forĵetaĵoj kaj aliaj sekundaraj krudaĵoj kaj ankaŭ kuracvegetaĵoj. Du el niaj anoj donacis la sangon. Estis forlaboritaj 365 brigadoroj.

La jarkunveno estis konkludita per jena rezolucio: Garantii la plenumadon de la laborplano por j. 1987. Plialtigi la nombron de anaro. Kontinui en la laboro kun OMR /Distrikta packonsilantaro/. Aligi al la solenoj okaze de la centa datreveno de Esperanto.

(Müllerová)

# —POR LA JUBILEA FONDUSO—

- Ing. Vl. Ondryš, Přerov  
A. Karásková, Olomouc  
Ing. Z. Znamínko, Praha  
S. Škrla, Kyjov  
G. Gajdzica, Třinec  
V. Kocián, Bystřice p. Host.  
N. Minářová, Opava  
K. Michelková, Aš  
Prof. J. Tylš, Dolní Radechovná  
M. Milerová, Karlovy Vary  
JUDr. K. Hromádka, Pardubice  
Ing. M. Kubina, Velký Borek  
MUDr. S. Horák, Rýmařov  
L. Klíma, Tachov  
L. Severová, Pardubice  
MS Znojmo  
P. Jačka, Kroměříž  
Z. Indrová, Úvaly  
M. Kovaříková, Poděbrady  
N. Rujíková, Brno  
Z. Lochařová, Praha 9  
O. Pečáková, Praha 10  
manž. Sitkovi, Pardubice  
J. Jahnová, Praha 5  
M. Křížová, Pardubice  
V. Hasala, Kopřivnice  
E. Techniková, Tanvald  
R. Kopecká, Praha 8  
K. Hubnová, Praha 7  
M. Mikolajková, Ostrava  
Ing. J. Šafránek, Kunštát  
J. Polák, Ronov  
V. Fronková, Pardubice  
L. Varhaník, Kouty  
Ing. S. Votoupal, Frýdek-Místek  
J. Urc, Teplice  
K. Stanková, Pardubice  
E. Jelínková, Třebíč  
Dr. V. Ulricová, Moravany  
A. Štunc, Hýskov  
M. Machková, Hradec Králové  
M. Uhlíková, Brandýs n. Lab.  
M. Herclová, Praha 3  
H. Kadařová, Příbram  
E. Dadák, Louky n. Olší  
M. Stejskalová, Miletín  
J. Trojan, Praha  
J. Sadílek, Chotěboř  
M. Vašáková, Pardubice  
A. Jakubec, Hranice
- M. Čekal, Děčín 5  
S. Šírová, Turnov  
M. Kučerová, Brno  
J. Pytlík, Bystřice  
F. Szappancsik, Svatoňovice  
T. Folta, Stará Bílá  
Ing. M. Šlechtová, Jaroměř  
M. Werl, Třebíč  
M. Pastrnák, Havířov  
J. Wild, Tábor  
manž. Štěpánkovi, Praha 4  
V. Šimoník, Slavkov  
V. Navrátil, Pardubice  
M. Dufková, Libčice n. Vlt.  
V. Král, Černíkovo  
A. Rosslová, Kraslice  
M. Mášová, Slavičín  
P. Rablová, Ostrava  
Ing. Khail, Praha 6  
S. Solničková, Chrudim II  
Ing. V. Koloničná, Frýdek-Místek  
M. Macháčková, Brno  
MS Domažlice  
J. Růžičková, Duchcov  
Ing. L. Janovský, Sokolov  
H. Nováková, Kopřivnice  
J. Krampla, Přerov  
J. Gýra, Vodochody  
J. Mertová, Bystřec  
A. Štěpánek, Poděbrady  
J. Ševčíková, Klatovy  
J. Škvor, Litvínov  
M. Sedláčková, Svitavy  
B. Hudec, Brno  
J. Novák, Brno  
K. Muzikář, Perná  
A. Bretšnajdr, Skalce  
L. Hradilová, Brno  
Ing. J. Rosypal, Brno  
B. Killerová, Frýdek-Místek  
M. Koráb, Vsetín  
M. Sraldová, Byšice  
M. Paskerová, Praha 8  
C. Vrbík, Dub n. Mor.  
V. Rezlerová, Praha 4  
J. Pukl, Blansko  
K. Ryšánek, Praha  
J. Verner, Cotkytle  
O. Kovář, Vsetín  
EK při SK ROH Hranice

# lingva angulo

Jiří Karen.

## TRADUKADO KAJ ĜIA REALA BAZO - VORTAROJ

La tradukado estas unu el la plej efikaj metodoj, kiel komplete ellerni la lingvon. Tradukado el ĉeĥa lingvo esperanten inspiras la tradukanton elserĉi vortojn nekonatajn al li. Tradukante simplajn tekstojn, oni povas iluzie pensi, ke ni jam konas la lingvon. Tradukante pretendeman aŭtoron, kies stilo brilas, kies enhavo de la libro tradukita riĉas je multaj vortoj, nuancoj de la vortoj, oni konstatas: multon mi devas ankoraŭ lerni. La plej problema estas situacio: vortoj de mi bezonataj mankas en ĉiuj vortaroj. Kio nun? Ni serĉas en vortaroj eldonitaj en fremdaj lingvoj. Necesas tio, ĉar niaj du vortaroj en lingvo ĉeĥa: Esperanta Ĉeĥa poŝvortaro far A. Hromada, eldonita el la jaro 1969 jam elĉerpigis kaj nova eldono? Velký slovník česko-esperantský far fratoj Filip, eldonita en la jaro 1949 estas vera rarajo. Kiu konas la lingvon germanan, povas konsulti Taschen Wörterbuch: Esperanto-Deutsch /Dr-o E. Dieter Krause/, kiu konas la rusan, konsultas Esperanta rusa vortaro /E.A.Bokarev, 1982/, kiu konas la slovakon, uzas vortaron, kiu eldoniĝis en la jaro 1970, parto slovaka-esperanta. Sed klaras, ke tradukanto, serĉanta la mankantan vorton, devas perfekte koni la fremdajn lingvojn. Ankaŭ la slovaka estas malfacila helpilo, ĉar alfabete la vortoj slovakaj kaj ĉeĥaj ofte tre varias. Kiu volas traduki el esperanto ĉeĥen, havas nun al dispono nur vortareton far Hromada, slovakon vortaron esperanto-slovakon kaj kiu konas la germanan, havas al dispono: Deutsch-esperanto Wörterbuch kaj PIV /Plena ilustrita vortaro, eldonita 1977/. Sed KIU POSEDAS PIV, libro multekosta kaj malfacile aĉetebla. PIV por la tradukoj el ĉeĥa esperanten malmulte helpas. Serĉi vorton, kies alfabet-registron vi ne konas? Tre urĝa informo. En la jaro 1983 aperis en Saarbrücken ĉe Artur E. Iltis vortaro, preskaŭ nekonata en nia lando: NEOLOGISMA GLOSARO /Eta poŝtrikolto al PIV/, Aŭtoro: Henri Vatré, kunlabore kun prof-o Waringhien kaj Reinhard Hauptenthal. /Mil vortoj mankantaj en PIV aŭ tie registritaj, cu kun alia signifo, cu per alia grafismo.

Bedaurinde tiu ĉi vortaro ne estas konata al niaj esperantistoj. Tio kaŭzas multajn miskomprenojn. Kiu uzas la vortaron ĉe ni nekonatan, tiun oni suspektas, ke produktas neoficiale novajn vortojn. Sed tiu ĉi kritiko nur montras la nespertecon kaj nekonon de la kritikantoj. Nescio ne estas argumento kaj se estas, la afero estas groteska. Tiuj, kiuj laboras surnivele, estas kritikataj kaj oni asertas, ke ili volas detrui Esperanton ktp. Do, samideanoj, studu, konu la situacion kaj poste kritiku. La lingvo Esperanto estas lingvo parolata kaj oni verkas en ĝi. Nova mondo rapide evoluas kaj tiu mondo kun siaj bezonoj bezonas la novajn vortojn. Ni asertas tamen, ke Esperanto kapablas evolui. Do kial kritiki tiun normalaĵon, kiel evoluon? Ekde la vortaro de fratoj Filip jam pasis pli ol 40 jaroj, preskaŭ duono de jarcento.

Oni akre kritikis la broŝuron far J. Rumler: Abunde kaj redunde. Paradoksa situacio: tiu ĉi broŝuro estas bazita sur la vortaro far Vatré kaj enhavas terminojn, kiujn uzas tiu ĉi vortaro. Do dank' al J. Rumler niaj legantoj havas je dispono la terminojn mankantajn en PIV. J. Rumler aldonis el propra inventemo ĉirkaŭ 40 vortojn. Tiun fakton ni konstatis en nia kunveno de Art-literatura sekcio la 21-an de februaro 1987. Vortaristoj ne forgesu aĉeti tiun ĉi necesan aldonon al PIV.

Adolf Staŭra

## K O N T R A Ŭ A B U N D E C O K A J R E D U N D E C O

Unue kelkaj citaĵoj:

Karel Čapek: Milito kontraŭ salamandroj: Laŭ ĉeŝa eldono, Praha 1981, p. 146: "...en reformitaj lernejoj ili /la salamandroj - noto de A.S./ lernis Esperanton kiel interkomprenigan lingvon. Plie estis kreitaj en tiu tempo eble kvin aŭ ses novaj Universalaj Lingvoj, kiuj volis forigi la babelan konfuzon de lingvoj homaj... Fine el la afero rezultis, ke en ĉiu nacio estis propagandata alia Universalaj Lingvo."

Rikardo Sulco: Pledo por unueca lingvo, Paderborn 1985, p. 58, 59 /al Karolo Piĉ/: "...cu nun ĉiuj ĉinoj eklernu ĉi tiun ĉifitan Esperantaĉon de la ĉeŝo Piĉo kun ĉiuj ĉi ab, ak, aŭtem, enim, nam, olim, tum kaj tunk? Kaj vi idioto penas, penegas montri al la esperantistoj la gustan diferencigon inter tiel kaj tiom..."

Paĝo 61: "Al mi doloras la koro. Ne, ĉar vi estas stultulo, verkis fusaĵon /t.e. la libro "La Litomiŝla tomboĵo" - A.S./, skribis sengustan artalon, romanis kiĉon... Ĉar la plej simpla, sed tamen strikta Esperanta disciplino malpermesas al mi akcepti viajn ... trompe brilegantajn proponojn."

D-ro Detlev Blanke, en "der esperantist", n-ro 138/4/1986/, p. 92 - recenzo pri "Pledo..." de R. Sulco: "Prave li /t.e. Sulco - A.S./ atakas la psikopaton Karolo Piĉ, kiu inventas la plej strangeajn kaj komplete superfluaĵojn neologismojn."

La sama aŭtoro en la UEA-revuo "esperanto", n-ro 967-968 /7-8/ julio-aŭgusto 1986 - recenzo pri "Li kaj ni. Festlibro por la 80-a naskiĝtago de G. Waringhien": "...Komplete katastrofa, kvazaŭ dorno en la bukedo, estas la somnambula Evoluo de Esperanto de Karolo Piĉ, kiu jonglas per bombastaĵoj senenhavaĵoj kaj lau kiu la bedaŭrinda lingvo de Zamenhof disponas pri magiaĵoj kiel i.a. "absoluta strukturo, perfekta artefariteco, absoluta skemo, maksimuma simpla, uniuersala kombineblo, centprocenta konstanteco, senekzempla unikeco" ktp. Ni krome ekscias en la neologisme mania lingvaĵo de Piĉ, ke "Esperanto ne evoluas... eĉ ne povas evolui" /p.290/ kaj ke "Esperanto senĉese abrupte evoluas" kaj "tamen tute ne ŝanĝiĝas" /p.292/. Komprenu kiu povas."

Rob Moerbeek en la UEA-revuo "Esperanto" n-ro 969/9/ - septembro 1986, p. 154, pri la 9-a esperantologia konferenco en Pekino: "En la sekva diskuto klarigis, ke ne ĉiuj aziaj lingvoj, sed ĉefe la sudorientaj malhavas la aluditan "redundancon" /forme bundon/, /noto de A.S.: verŝajne mankas nun la vortoj: kaj ili estas.../ tipe koncizaj en la esprimado. Iu oponis, ke ĝuste eŭropaj lernan-

toj penas balasti Esperanton per sialingvaj distingoĵoj, kio malfaciligas ilian lernadon... Klaran bildon pri malfacilaĵoj de Esperanto por japanoj prezentis s-ro Kurisu Kei, kiu mem post la angla kaj franca /substrekiis A.S./ preskaŭ lude lernis nian lingvon kiel 20-jarulo. Malmultaj japanoj praktikas Esperanton, ofte aŭdigas la plendo pri troa eŭropeco. En 1923 Japana Esperanto-Kongreso eĉ kondamnis la neologismemon de Literatura Mondo, kio elvokis fortan proteston de Kalocsay... Tamen, la plej uzataj vortoj - s-ro Kurisu Kei donis dekojn da ekzemploj - neniel similas inter la japana kaj Esperanto... La Esperantaj elementoj estas tre malfacile ellerneblaj kaj memoreblaj por japanoj. Aldone de frazkonstruo ofte estas inversa: "Ankaŭ la patro de mia amiko estas laboristo" en japana sinsekvo estas "mi-de amiko-de patro ankaŭ laboristo estas".

El popola Ĉinio publikigadis kurson de la ĉina lingvo por esperantistoj en 1985-86. El tiu oni povis ekzemple ekscii, ke hotelo estas fendian, telefono - dianhua, taksio - che, ses horoj dek kvin minutoj - liudian yike, gratulo - zhuhe. Kio do estas la inter-nacieco de la hindeŭropaj vortoj? La frazo: "Pardonon, s-ro Ŭang, kie oni loĝigas nin?" sonas el la ĉina: "Ŭang ainĵor-, bonvol-demandni est- aranĝ- loĝ- kie?"

Vilmos Benczik redaktis "Literaturan numeron" de la UEA-revuo "esperanto", n-ro 971 /11/, novembro 1986. Inter la aŭtoroj kaj fragmentoj el iliaj verkoj estas ankaŭ Karolo Piĉ. Benczik konscias /p. 182/, ke ties "beletra kontribuado cetere probable elvokos kelkajn koleraĵajn leterojn." Kial ne, se oni trovas en ĝi vortojn "edifico, nok, bizniso, ples, blinkas, verdatre, erst, dos, neĝea habito, finim, despera, kling, klang".

Karolo Piĉ en la sama n-ro diras sur p. 184: "Kaj mankas almenaŭ dek mil senlecaj kaj aĉetemaj E-legantoj."

Certe estus pli bone, se oni la lokon, oferitan al Piĉ, estus dediĉinta al iu "normala" aŭtoro.

- o -

Karel Ĉapek skribis La militon kontraŭ selsamandroj en 1936. Legu ankoraŭfoje la lastan frazon en la citaĵo. Ĝi plenumiĝis, sed en iom alia formo. De temp' al tempo aperadas diversaj "plibonigantoj", por kiuj "la kara Esperanto" ne estas sufiĉe perfekta kaj bezonas ŝanĝojn kaj kompletigojn. La plej freŝa pruvo pri tio estas la "praga literatura skolo". En efektiveco temas pri du personoj - ili estas Josef Rumler kaj ŝi - Akademianino Eli Urbanová. Ili eldonis broŝuron "Abunde kaj reŭunde", en kiu povas leganto trovi eble 300 - 400 neologismojn. Kaj ne unu neologismon por unu "malnova vorto", sed eĉ plurajn: ekz. kaj - sk/p.26,29/, ed /p.29/. Kaj oni legas tian frazon /p.28/: "En mia sinonima vortareto temas precipe pri kontribuadoj de tri aŭtoroj: ab Karel Piĉ, of Josef Rumler kaj far Eli Urbanová"/substrekiis A.S./ Tion diras Rumler. Trastudu la 20-paĝan dense presitan "eseon" far Rumler, por ke vi eksciu, kial estas necesa abundeco kaj reŭundeco en beletra, kial do oni diru ne nur de kaj far /kiu jam sufiĉe ofte uzatas/, sed ankoraŭ ab kaj of Plu mi legas sur p. 22: "Nun danke al la eksperimenta iniciativo de Piĉ, Diego, Vatré kaj plujaj kolegoj... disvastiĝis tiu ĉi maniero sur la teritorion de arta stilo ĝenerale..."

La lastaj vortoj estas granda troigo. Inter la far Benczik elektitaj verkistoj en la literatura n-ro de "esperanto" estas krom Piĉ ankaŭ M. Boulton, E. de Kock, Lorjak, Miyamoto M., I. Nemere, B. Ragnarsson, R. Rossetti, G. Silfer, S. Ŝtimec, A. Goodheir, I. Szabó, O. Kníchal kaj kelkaj malpli konataj, do preskaŭ la kompleta "kremo" de nia nuntempa beletra. Neniu, escepte Piĉ, perme-

sis al si tion, pri kio fervoras Rumler. Piĉ estas far Rumler aludata kiel inspiranto de la "praga skolo", sed vi jam legis, kion pri li pensas du cititaj aŭtoroj.

Kaj oni pripensas tion, kion diras azianoj pri Esperanto. La novaj neologismoj estas prenitaj el hindeŭropaj lingvoj. Tia taktiko signifas pluan "eŭropigon", malfaciligon de Esperanto por nehindeŭropaj lingvanoj.

Atentinda estas la transpreno de la angla prepozicio "of" far Rumler. En tiu senco, kiam elektis Rumler, angloj uzas la prepozicion "by" /baj/. Oni diras angle: A novel by Walter Scott - romano far /de/ Walter Scott. Angloj do devus lerni, ke ili ne diru "by", sed "of". Atentu ankaŭ la vorton "novel", kiu signifas "romano", do tiu ĉi vorto ne estas komuna en ĉiuj hindeŭropaj lingvoj. Rumler evidente volis nur prezenti sian "abundecon kaj redundecon", ĉar kiel bona poeto kaj stilisto li certe scias, ke la frazo estas direbla sen la tri prepozicioj: "...kontribuadoj de tri aŭtoroj: Karel Piĉ, Josef Rumler kaj Eli Urbanová."

Tiu ĉi Akademiano en sia komentario sur p. 32 de Abunde kaj redunde ne nur duafoje ripetas la argumentojn pri neologismo, kiujn oni jam povas legi sur p. 7 /Rumler/, sed ĉi citas leterojn pri Rumler, skribitajn far R. Rossetti, W. Auld, L.H. Knoedt kaj J. Régulo Pérez. Sed tiuj leteroj rilatas la broŝuron - Kvarfolio-, en kiu aperis granda poemo de Rumler - Lasta ĉevalo-, kaj en ĝi kaj en poemoj de aliaj tri aŭtoroj oni trovas ĉirkaŭ 40 neologismojn. La leteroj laŭdas la poezian talenton, ne la neologismojn. La poezian talenton oni povas kontesti al neniu, kiu ĝin posedas, sed tio, kion faras Rumler por "plibonigo" de la arta valoro de Esperanto, estas nur malutila por nia lingvo.

K. Piĉ konscias, ke la Esperantaj libroj bezonus almenaŭ dek mil aĉetantojn, sed per sia "pliboniga" agado li kaj liaj imitantoj povas nur mallerte malgrandigi la nombron de aĉetantoj. Aŭ ĉu Piĉ kredas, ke li pliamigos vicojn de esperantistoj, ke esperantistoj estos avidaj pri liaj novaĵoj?

Sajnas, ke Esperanto bezonas Akademion ne tian, kia ĝi nun estas, sed institucion vere normigan kaj devigan por ĉiu, kiu volas verki en gusta Esperanto, normilan kia estas por la ĉeĥa lingvo Ústav pro jazyk český - Instituto por la ĉeĥa lingvo, kies reguloj por la ĉeĥa lingvo estas devigaj por ĉiu, kiu volas diri, ke li scias perfekte la ĉeĥan lingvon.

Josef Rumler estas bona poeto kaj sciinto de la lingvo, sed kiel ano de la Esperanta movado li estas nepre komencanto - li esperantistiĝis en 1978 kaj jam li volas starigi sur kapon la centjaran tradicion de Esperanto.

Adolf Stanura  
prezidanto de la Lingva komisiono  
de Ĉeĥa Esperanto-Asocio

Miroslav Malovec

### ABUNDE KAJ REDUNDE

Aŭtune 1986 eldonis la literatura sekcio de ĈEA 32-paĝan broŝureton "Abunde kaj redunde" de la konata ĉeĥa poeto Josef Rumler, kun subtitolo "eseo pri diversaj stiloj en la internacia lingvo - plus sinonima glosaro de Praga artiliteratura skolo." En la broŝureto aperis ankaŭ du artikoloj de la nova akademiano Eli Urbanová "Arta tredukado Esperanten eblas" kaj "Pri Josef Rumler kaj Praga

artliteratura skolo." Se la eseo estus verkita en la klasika Esperanto, la publiko sendube akceptus ĝin kun entuziasmo, ĉar tiel detala priskribo de la unuopaj funkciaj stiloj en Esperanto ĝis nun mankis. Kvankam kelkaj asertoj estas diskutablaj, kaj oni ne orientigas en la teksto tre facile, ĉar la aŭtoro dividis sian verkon nur en tri netitolitajn ĉapitrojn, la esprimitaj ideoj estas instigaj, precipe pri la beletra stilo kaj ĝia bezono de multaj sinonimoj. Tamen la literaturistoj volis ŝoki kaj veki la dormeman legantaron /kiu ofte neglektas la literaturajn verkojn/ kaj almetis liston de kvarcent neologismoj kiel proponatajn sinonimojn. Kvankam en la propra eseo estis uzitaj nur dudek el ili, en la legantaro estiĝis optika impresio, ke uzitaj estis ĉiuj, ke la aŭtoro intencas reformi Esperanton ktp. La ŝoko estis tiel sukcesa, ke la literatura sekcio ricevis multajn protestleterojn, plejparte skribitajn en gentila ironia stilo, sed aperis ankaŭ kelkaj insultaj anonimaĵoj, kies estigintoj /kvankam en sia argumento ofte pravaj/ montris per vulgareco malaltan nivelon de spriteco kaj kuraĝo kaj malkapablon toleri fremdan opinion kaj diskuti pri ĝi. Por la nova "dialekto" aperis moka nomo "Rumlerando".

Sabate la 21-an de februaro 1987 kunvenis en la ĉambro de la Praga klubo la literatura sekcio kun intereso por tradiskuti la verkon. Komence s-ino Eli Urbanová tralegis kelkajn fragmentojn el sia verkata aŭtobiografio "Hetajro dances", kaj poste oni tuj alpaŝis al la diskuto.

Unue s-ano Rumler tralegis kelkajn ideojn el alvenintaj leteroj, enlandaĵ kaj eksterlandaĵ. La skribintoj laŭdis la priskribon de la funkciaj stiloj, sed mallaŭdis la enkondukadon de neologismoj. Laŭ ili la aŭtoro pripensu, kial oni ofte skribas pri la "Zamenhofa lingvaĵo", li ne forgesu, ke beletraĵoj estas destinitaj por la vasta publiko kaj tial ili devas esti verkitaĵ per vortoj, kiujn la legantaro konas, por enkonduki kvarcent neologismojn necesus traduki Esperanten centojn da prestiĝaj verkoj de la mondlliteraturo kaj ne tridekpaĝan broŝureton, la aŭtoro ne trudu al la movado sian dialekton, sed lernu pli bone uzi la klasikan Esperanton ktp.

Josef Rumler poste montris glosaron, eldonitan en eksterlando, kaj du numerojn de "der esperantist", en kiuj aperis listo de multaj novismoj - jen fontoj de liaj neologismoj en la broŝuro kaj pruvo, ke la bezono de abundo de sinonimoj sentas ĉiu beletristo. Tamen, la literaturistoj ne intencas uzi "Rumlerandon" en la praktiko - la broŝureto estas nur eksperimenta teksto, kiu volas diskuton kaj meditado pri la problemo, montri kiel Esperanto aspektus, se ĝi havus pli multajn sinonimojn, prilimi la supozeblan evoluon de la internacia lingvo kaj ĝia beletra stilo en la venonta jarcento, kaj konekti en la mensoj de esperantistoj la fakton, ke ĉiu lingvo havas tri ĉefajn funkciajn stilojn kaj ke ĉiustilo havas diferencajn bezonojn. Ke por la komuna stilo validas "sufiĉe kaj neceso", por la faka stilo "koncize kaj precize" kaj por la beletra stilo "abunde kaj redunde /=superflue/". La samon oni povas legi ankaŭ en nacilingvaj lernolibroj de stilistiko. La faka stilo bezonas por ĉiu nocio /= signifo/ nur unu precizan esprimon /terminon/, dum la beletra stilo multajn sinonimojn, inter kiuj estas malgrandaj diferencoj signifaj /ne ĉiu ĉevalo estas stalono/ kaj stilaj /neŭtrala esprimo, poetismo, slangismo, trivialismo, dialektismo, arkaismo/.

Jiří Karen aldonis, ke esperantistoj jam tute forgesis disku-

ti, ke ili klopodas por interkomprenigo inter la homoj, sed ili mem kverelas unuj kontraŭ la aliaj kaj ne toleras alian opinion ol la propran. Ke multaj anstataŭ veni kaj diskuti nur sendis rifuzaĵn leterojn aŭ eĉ sekrete kalumnias la literaturan sektion. Tamen - multajn miskompresojn oni povus preventi, se la broŝureto komenciĝus per atentigo, ke ĝi estas eksperimenta teksto por meditado ne por tuja praktika uzo, ke la menciitaj neologismoj estas ĉerpitaj el eksterlandaj fontoj kiel kuriozaĵo. La legantoj prave opiniis, ke temas pri elpensajoj de la Praga literatura skolo, kiujn ĝi volas enbrudi al la esperantistaro kiel sian reformon de Esperanto. La impreson plifortigis la fakto, ke la broŝureto aperis baldaŭ post la akademia rifuzo de la prepozicio "far", kio donas al la eseo karakteron de spitema maldisciplino. Krome, la teksto estas senbezono tro longe. Sur dudek paĝoj /de la propra eseo/ povus aperi malgranda kurso de stilistiko /pri stilaj figuroj ekzemple/, kio estus pli konvinka ol rekta ripetiganta kaj laciga konvinkado pri bezono de sinonimoj.

En plua diskuto aŭdigis demandoj, kiamaniere povas neologismoj eniri la lingvon kaj kiamaniere tio ne eblas; gravas, ĉu nova esprimo koncernas nur periferion de la homaj interesoj /ekz. nomoj de plantoj/, aŭ ĉu temas pri signifoj fundamentaj /kvalitoj, agoj kaj objektoj de la ĉiutaga vivo/ aŭ ĉu novismoj "pliriĉigas" pronomojn, numeralojn, simplajn adverbojn, prepoziciojn, konjunkciojn kaj subjunkciojn. Neologismoj de la unua kategorio eniras la lingvon facile po miloj; en la duan grupon estas tre malfacile penetri kaj multaj novismoj malgraŭ granda propagando /kurta, olda, mava, trista/ ankoraŭ ne tute sukcesis; sed en la trian kategorion estas preskaŭ ne eble enigi, kiel pruvas la akademia rifuzo de la relative ofta prepozicio "far". Tamen, se aperos nova esprimo, ĉu ĝi havos karakteron de poetismo? "Stalono" povas esti uzita anstataŭ "virĉevalo" same bone en poemo kiel en faka libro pri ĉevalbredado kaj ankaŭ en simpla konversacio inter spertaj esperantistoj. La vortoj en Esperanto /kiu estas por siaj uzantoj fremdlingvo/ estas sentataj eble kiel pli bone konataj /virĉevalo, virkapro, maljuna, malgaja/ kaj malpli bone konataj /stalono, boko, olda, trista/, sed malpli granda konateco ankoraŭ ne donas pli grandan poeziecon. Temas pri io alia: nova radiko helpas eviti ripetadon /komparu: la aktoroj prezentis sian prezentadon - la aktoroj prezentis sian dramon/ kaj en la mal-vortoj estas sentata la origina signifo de la radiko: "malgaja" estas kvezaŭ "negaja" aŭ "nesufiĉe gaja", dum "trista" esprimas multe pli profunden malgajecon. Eblas do gradigi: negaja - malgaja - trista. Sed diri "trista" pri homo, kiu estas nur "malgaja", estus eraro, tial ne eblas eviti mal-vortojn ankaŭ en la beletra stilo. Necesas nur scii, kiam kiun uzi.

Ĉiuj plibonigantoj de la internacia lingvo devas ankaŭ konscii, ke ĝi konsistas ne nur el vortoj kaj gramatikaj reguloj, sed ankaŭ el riĉa ĝisnuma literaturo kaj gazetaro, el centjara tradicio kaj en miliono da uzantoj, en kies cerboj ekzistas komuna imago, kiel Esperanto aspektas, kio al Esperanto apartenas kaj kio ne. Ĉiu novaĵo devas penetri en tiun komunan imagon, kaj tio ne estas facila afero. Ĝi estas tiom pli malfacila, ke esperantistoj vivas disŝutitaj sur la tuta planedo, kaj ke ili malmulte legas la literaturon. Ili estas bremsa de la evoluo, sed bremsa necesa por la lingva stabileco. La ceteraj lingvoprojektoj klare montras, kiel dangece estas, se la intelektulara avangardo kuras tro rapide antaŭen kaj subite restas sola. Lingvon ne eblas konstrui kiel maŝinon aŭ domon, sed evoluigi kiel socian fenomenon.



La tempo de la kunveno rapide pasia, multaj ne sukcesis diri sian opinion. Ci tiu "raporto" ne estas objektiva, la aŭtoro ne povis senigi de siaj subjektivaj vidpunktoj, multaj el la menciitaj ideoj kaj opinioj ne estis eĉ diritaj dum la kunveno, sed trapensitaj pli poste kaj aldonitaj kiel aŭtora komento pri la diskuto.

Sonja Zedníková

## Opinioj de simpla leganto

(fragmentoj)

Mi ricevis donace malgrandan gracilan libreton, verkitan de s. Josef Rumler kaj eldonitan kiel komplemento de la revuo "Paco". Kun granda intereso mi malfermis ĝin kaj tuj eklegis. La du unuaj paĝoj de la nova broŝuro prezentis du poemojn "Praga elegio" kaj "Matena melkado". Ili ne trompis min. Ambaŭ plaĉis al mi.

La eseon mi legis malfacile. Mi regas Esperanton sufiĉe bone kaj mi kutimas legi librojn en Esperanto por miaj amuzo kaj lernado. Mi scias, ke diversaj aŭtoroj havas diversajn stilojn kaj uzas diversajn vortojn, iam novajn kaj nekutimajn, koncize neologismojn. Ciu aŭtoro tion faras en alia kvanto. Sed ĉe Rumler en lia eseo ili vere ne nur abundas, sed redundas. La eseo estas publikigita sur 26 paĝoj. La tuta kajero havas 32 paĝojn. Sur du kaj duono de paĝoj estas presita glosaro de neologismoj. Du kaj duono de paĝoj dense kaj per etaj literoj presitaj! Kaj ili ĉiuj vere estas uzitaj en la eseo kaj aliaj artikoloj. Mi devis ĉiunomente foliumi kaj serĉi nekonatan vorton en la glosaro. Ŝajnis, kvazaŭ mi legas ne Esperanton, sed alian similan lingvon, tamen al mi nekonatan. Ĝiam mi tralegis kelkajn paĝojn kaj la senco de la eseo pro troa paŭzado kaj serĉado de vortoj malaperadis kaj fine fugis tute de mia menso, mi ne plu havis ĝuon de la legado.

Plaĉis la mi krom la poemoj la artikolo pri "Karesnomoj rilate al infanetoj". Iam mi volis instrui al mia fileto Esperanton, do mi kantis al li kantetojn, ludis kun li ludetojn kaj alparolis lin en Esperanto. Tio okazis eĉ en plej eta lia aĝo, kiam li komencis entute paroli. Tiam mi nepre bezonis tian "infanan vortareton" en Esperanto, kiun prezentas s-ro J. Rumler. Kaj mi ne havis ĝin, ankorau ĝi ne ekzistis.

La projekto de la aŭtoro, lia intenco abundigi la esprimadon per la sinonimeco kaj nuancigemo de la vortoj estus bone digestebla. Sed, ĉar ili en la teksto svarmas, ŝajnas al mi, ke tre kaj tre rezulte estas tro. La abundo estas supermezura kaj la redundo estas netolerebla kaj supernatura. Ĉu tio vere estas nepre necesa por esprimi novajn literaturajn ideojn? Multe min ĝenas iuj pronomoj, adverboj kaj adjektivoj, kiuj koincidas kun korelativoj. Kial ili estas forme duobligitaj eĉ triobligitaj? Kial la aŭtoro uzas krom tie ankaŭ ibe, krom kiel ankaŭ kom, krom ĉia eĉ omna, anstataŭ neniu - nulu k.s.? Plej multe ĝenas min multaj novaj afiksoj. Ili trafaas rekte la bazon de la lingvo, la gramatikan strukturon kaj formas jam sur la grundo de la bona malnova Esperanto de Zamenhof ian monstran superkonstruon - ili ne plu estas nur neologismoj, sed - kio do propre?

A. Staņura taŭge atentigis (n-ro 6/86) pri iuj lingvaj problemoj de ĉenaj esperantistoj, kiuj sub la influo de sia gepatra lingvo kelkfoje uzas ĉenismajn esperantigojn. Li ankaŭ provas solvi en Esperanto gis nun neviditajn terminojn por nocioj jam ekzistantaj, ekz. bunda, džinsy k. s.

Mi volas atentigi je iuj miaj spertoj pri tiuj terminoj.

GRIL. Kiel eblan Staņura proponas "rulrostilo". Por "gril" ne rulata ekzistas jam en Plena vortaro: kradrostilo.

DABOVAT (film). PIV havas "dubli", J. Kořínek uzis la interesan "translingvigi".

LEGRACE. La proponita "drolaĵo" (adj. drola) ne kongruas kun la difino en PIV: "komike s t r a n g a". Ja "legrace" nur malofte estas "stranga komikaĵo". Laŭ tiu difino "drolaĵo" ne plene taŭgas por "legrace". En la franca la vorto "drôle" signifas tamen nur "žertovný, směšný, čtverák" k.s. Se Waringhien ne estus metinta en tiun difinon "stranga", tiam "legraĉni" povus esti ekvivalenta al "drola". La franca drôle estas tradukebla iukaze ankaŭ "povedený" (Oj, to je povedený!).

BUNDA. PIV proponas "anorako", kun la difino: sporta ventkaj pluvimuna (nepromokavý) jako kun kapuĉo. Do unualoke: větrovka, du-aloke uzbla ankaŭ por "bunda".

DŽINSY. En "Literatura Foiro" uzita: ĵinso. "Praktika Bildvortaro de Esperanto" (Oxford, 1979) proponas: ĝinzo. Evidente la unua pli taŭgas.

HIT. (Angle: rána, úder, trefa... respondas al la duonĉena "šlágr". Same en la germana: schlagen signifas udeĉiti.) La plej uzbla saĵnas al mi "furorkanto" (uzas ankaŭ Radio Polonia), aŭ furorkanzono; H. Seppik uzis foje "ŝlagro". Jarlibro UEA uzas simple: modkantaĵo, E. D. Krause (Germana-Esp.vortaro): modkanto; furoraĵo; J. C. Wells (Esp. and English Dictionary): modkanto, ŝlagro (kun atentigo pri malofteco de la lasta). J. Kořínek proponis: 1) "lido" (sed Waringhien difinas ĝin: "germana popola lirikaĵo aŭ kanzono", do laŭ mi ne respondas al "hit"), 2) "hito" (kun koncerna eksplika glosa).

STŘIH, stříhat (ve filmu). PIV uzas "munti" (elekti kaj kunigi diversajn filmscenojn). Same la francoj uzas por "střih" en filmo "montage"; tiuj terminoj estas pli esprimivaj ol ekz. "tondo". Do: muntaĵo.

TEPLÁKY. Jam pluraj esprim-provoj estis faritaj; taŭgaj ŝajnas "trejnpantalono, trejnvesto", J. Cink uzis "varmkalsono". - Simile "trenýrky" estas esprimebla per "trejn-pantaloneto, trejnkalsono". (Ĉu iu leganto konas ion pli adekvatan, trafan?)

La pliaj menciitaj terminoj: oteplovačky, dupačky, válenda (certe plus aliaj) estas teknikaj terminoj, solvendaj de fakula teamo. "Rifle" ŝajnas esti nur komerca marko, simile kiel nia "lux" (polvosuĉilo).

## ĈAPITROJ PRI LA SINDEFENDO

© Ing. Ivan Špička kaj Ing. Jindřich Novák

## 2.3. Translokadoj kaj staroj

Por esti kapablaj transloki nin laŭeble plej rapide, ni ne apliku ordinaran iradon, kiun ni uzas hejme, promenante, irante el laboro k.s. Translokante sin antaŭen, oni uzu sinforŝovojn aŭ FENTON, malantaŭen, sinforŝovon aŭ retrofenton. Translokante sin flanken, oni uzu la t.n. fenton aŭ sinforŝovon flanken (dekstren aŭ maldekstren). La movon ĉe tiuj ĉi translokadoj komencu ĉiam la piedo, kiu estas pli proksima al la direkto de la translokado. Sole tiamaniere oni povas certigi la plej grandan rapidecon de la movo. Per la alia piedo oni energie forpuŝu sin. Ĉe la sinforŝovo aŭ sinforŝovo oni poste almetu ĝin al la piedo, kiu komencis la movon. Ĉe la fento la forpuŝiĝinta (= distanca = apoga = star-piedo) restas surloke. Komence de translokado, oni havu dismetitajn krurojn en la direkto de la translokado, alie la parto de la uzebla forto en tiu ĉi direkto estas malgranda. La mascentro estu proksimume super la centro inter la piedoj. Sperto vidigas, ke la plej avantaĝa estas tia diskruriĝo, kiu egales proksimume al la distanco inter la ŝultroj, aŭ iom pli granda. Diskruriĝo ankoraŭ pli granda ebligas (en certaj limoj) pli fortan repuŝiĝon, tamen la almeto de la repuŝiĝinta piedo al la piedo, kiu estas pli proksima en la direkto de la translokado (= proksima piedo) estas pli malfacila. Tio malrapidigas la tutan translokadon. Dum translokado ni zorgu pri laŭeble la plej malgranda movo de la mascentro supren aŭ malsupren, ĉar tiu ĉi movo faras la komencon de la translokado pli facile identigebla kaj malplifaciligas la sekvantan translokadon. La plej oportunan starpozon rilate la eblecon transloki nin rapide montras la fig.4 (la t.n. batal-gardostaro). Ni staras ninturnintaj al kontraŭulo iom flanke, niaj plendoj situas laŭ la fig.5. El tiu ĉi starpozo, kiel videblas, oni povas rapide transloki sin ne sole antaŭen aŭ dorsen, sed ankaŭ flanken kaj en kombinitaj direktoj. Batalante senarmile, ni uzas la batalgardostaron ĉiam, kiam ni ĝuste



Fig.4




Fig.5

ne estas atakantaj. Sole antaŭ (aŭ pli bone dum) la striktasenca atako ni ŝanĝas ĝin, uzante oportunan gardostaron por efektiviĝi la pezan frapon. La gardostarojn ni priskribos kiel konsistaĵon de la frapoj. Proksimume egale oni aplikas la batalgardostaron kaj la ceterajn gardostarojn en la ĉefa speco de la karateo, branao. En la libro pri la japana karateo oni priskribas multajn aliajn gardostarojn. Ni ne rekomendas ilin, ĉar tiuj havas neniajn avantaĝojn rilate al la gardostaroj de ni rekomendataj kaj male, ili estas ofte tre maloportunaj.

La translokadon ni faru ĉiutage. Komence ni praktiku ĝin indidive, pli poste, kiam ni jam estas kapablaj translokadi nin sufiĉe rapide, ni komencu ekzerci ĝin kun partnero. Ni senĉese tenu paŝdistancon disde la partnero, li klopodu malebligi tion al ni kaj pliproksimigi sin. Post kelke da minutoj ambaŭ ekzercigantoj ŝanĝu sian rolon. Dum la ekzercigado oni devas uzadi sinalŝovojn por pliproksimigi sin kaj sinforŝovojn, por retiri sin disde la kontraŭulo. Tiu ĉi ekzercigado estas tre grava, ĉar de nia ebleco kaj kapablo transloki nin dependas grandgrade (laŭ la teknika vidpunkto), ĉu ni povas realigi la ellernitajn batalagojn por venki kontraŭulon. Tion ni substrekas antaŭ ĉio tial, ke junaj adeptoj de la sindefendo, se ili studas la sindefendon laŭ iu lernolibro, havas tendencon neglekti tiun ĉi fazon de la ekzercigado kaj ili emas tuj komenci lernadon de la batalagoj. La samo validas ankaŭ por la kvalito de la gardostaroj. Disĉiploj ordinare unu- aŭ dufoje faras la gardostaron kaj opiniĝas, ke ili jam scipovas ĝin. Tiel "ellernitaj" gardostaroj poste kaŭzas, ke frapoj ne estas sufiĉe pezaj.

#### 2.4. Frapoj

En la antaŭaj ĉapitroj ni esence elĉerpis la eblecojn, kiujn laiko havas por solvo de la sindefendo-situacioj. La laiko, kiu ne scipovas iun frapon, rompumon aŭ everton, sed kiu jam rezonis pri la solvo de la sindefendo-situacioj kaj havas sufiĉe da kuraĝo, prudenton kaj inteligentecon kaj kiu ne hezitus sendangerigi kontraŭulon per akirebla okaza rimedo. Tiun ĉi minimumon konu ĉiu, kiu ne havas tempon aŭ intereson studi la sindefendon pli serioze, malgraŭ tio volas plialtigi sian ŝancon venki laikon. La sekvontaj ĉapitroj estas dediĉitaj al la homoj, kiuj volas penetri pli profunden en la problemaron kaj bezonas ekposedi relative simplan kaj efikan rimedon por venki kontraŭulon. En la reduktita kurso estas racie - por sendangerigi kontraŭulon - lerni sole frapojn. Esence sufiĉas scii ok bazajn frapojn. Temas pri:

- rektmanfrapo (per manplato, tranĉilo, bastono, bastoneto)
- elekstera manfrapo (per pugno, bastono, bastoneto)
- manfrapo flanken (per pugnobazo, manplato-rando, tranĉilo, bastoneto, PUGNEO)
- elsuba piedfrapo (per la pinto de ŝuo)
- rektipiedfrapo (per kalkanumo de ŝuo)
- rektipiedfrapo flanken (per kalkanumo de ŝuo)
- alklin-piedfrapo flanken (per kalkanumo de ŝuo)
- elekstera piedfrapo el sube (per pinto de ŝuo)

Pli multe da batalagoj ne necesas lerni enkadre de la reduktita kurso. Por tiuj, kiuj volus havi supervidon ankaŭ pri aliaj frapoj, ni iujn priskribas.

## 2.4.1. Rektmanfrapo

La batalagon konsistigas:

- movo fare de batanta brako (en tiu ĉi libro estas la batanta membro ĉiam la dekstra, memkomprene oni lernu kaj praktiku ĉiun frapon ankaŭ per la maldekstra),
- movo fare de la nebatanta brako,
- trunkomoviĝo,
- forta kaj RUKA elspiro.


Nun ni priskribos la rektmanfrapon sufiĉe detale.

Ni atak-gardostaras (fig.6a). Nia dekstra brako troviĝas super la dekstra kokso (porekto de la membro) kaj ĝia mano loze pugnigas. La maldekstra brako estas modere antaŭmetita. La dekstra mano komencas proksimiĝi celen rektolinie (fig.6a-c). Finante la movon antaŭen, oni la batantan brakon pronas. Per tiu ĉi movo oni atingas necesan firmigon de la tuta brako. Ekkontaktigante la celon, la pugno estas do jam firme pugnigita.

La movo de la nebatanta brako videblas el la fig.6a-c. Ĝi finiĝu samtempe kun la movoj de la batanta brako, trunko kaj kun ruka elspiro. Sole tiamaniere kulminas en unu momento la ruka streĉiĝo de la korpo kiel tuto, kaj la manfrapo estas laŭeble la plej peza. Alie la jam firmigitaj korpo-partoj bremsus la movon de la ceteraj aŭ fine de la manfrapo la korpo de la batanto ne estus ĝuste firmigita. Tio rezultigus nepazan, malrapidan kaj facile anticipiĝeblan baton. La samo validas ankaŭ por kunigo de mov-eroj en ĉiuj aliaj frapoj.

La trunko turnas sin laŭ la fig.6a - 6c. Estas necese, ke la

Fig.6



direkto, en kiu oni rektmanfrapas, estu fine de la bato laŭeble la tanganto al la trunko-moviĝo. Alie oni utiligus en la rektmanfrapo malpli de la kineta energio de la trunko ol eblas.

Tre gravas ankaŭ la maniero de ruka elspiro. Ordinare ne estas ebl elspiri sufiĉe rapide tra la nazo. Tial oni elspiru kun ekkrio buŝe. Memkomprene ne estas akcepteble prepariĝi por tiu ĉi ruka ago tiamaniere, ke kontraŭulo povu el niaj faroj antaŭidentigi kaj vanigi nian batalagon. Per la rapida kaj forta elspiro oni atingas firmigon de la bruatkorbo kaj de la ventro. Sen tiu ĉi firmigo estas la batalago relative nepeza.

### La plej oftaj eraroj

- La kalkanumo ĉe apoga (distance) piedo leviĝas super teron,
- fine de la bato la batanta brako tro rektiĝas (ĝi estu iom fleksita) kaj
- la ventraj muskoloj ne estas sufiĉe streĉitaj (tio estas ofte rezulto de malbons korpo-teno),
- je la fino de la batalago la batanto anstataŭ la frapcelon rigardas la teron,
- la kapo fine de la bato kliniĝas al la ŝultro de la batanta brako,
- la piedoj ne estas sufiĉe dise,
- la pugno de la batanta brako ne estas ĝuste formita.

### Per kio oni batas

Plej ofte oni rektmanfrapas per pugno (fig.7 I-IV) aŭ manplato




Fig.7

FENTO (en la sindefendologio) rapidega elpaŝo (ordinare antaŭen) per la piedo, kiu estas pli proksima al la direkto de la movo. La alia piedo restas surloke (21)(ĉ: výpad).

- I fari FENTON (ĉ: učinit /udělat/ výpad).

PUGNEO estas ajna armilo, kiu ne plilongigas la atingopovon de brako kaj estas destinita por firmigo de la pugno aŭ anstataŭado de ne sufiĉe hardita frapsurfaco ĉe la fino de la brako (14)(ĉ: pěstník).

- I frapi uzante PUGNEON.

RUKE fari ion ekde la komenco ĝis la fino (plenumo) laŭeble plej rapide (vidu en /22/ "ho, ruk!").

## KIAM VALORAS LA RADIOELSENDOJ POR ESPERANTISTOJ

Se oni volas lingvon ne nur ekregi, sed ankaŭ ne forgesi, oni devas kontinue ĝin praktiki, esti en kontakto kun ĝi per legado, parolado kaj aŭskultado.

Legi povas ĉiu el ni - librojn pruntitajn aŭ aĉetitajn, kluban Bultenon, asocian periodaĵon ktp.

Paroli oni povas en tia klubo, kies gvidanto konscias, ke ĝuste pro tio la klubo ekzistas. Mi tute ne aprezas kunvenojn, kie oni parolas nur nacilingve, krom kunvenoj komitataj. Ĉia elturniĝo, ke por ekzerci la lingvon servas kursoj, signalas nur la lingvan nekaptablon de la gvidantaro. Ni ja scias, ke kursoj estas nur limtempaj, kongresoj kaj similaj arangoj ankaŭ ne okazas ĉiutempe, do la unusola eblo paroli estas en la klubo, rondeto k. s.

Koncerne aŭskultadon la afero ŝajne samas. Sed nur ŝajne. Oni ja ne povas postuli, ke ĉiuj geklubanoj parolu modele. Tia situacio estas ankoraŭ forege. Kaj ĉi tie aperas la graveco, la neanstataŭigebleco de Esperantaj radioelsendoj.

Por ni, loĝantaj en centro de Eŭropo, la plej kapteblaj estas la varsovia, viena kaj berna elsendadoj. Ĉar la du lastaj elsendas nur malofte, oni ilin akceptas kiel ŝatatan pliriĉigon. Sed baza estas la regula, ĉiutaga sesfoja eminenta elsendado de Radio Polonia, kiu siajn aŭskultantojn provizas per programlistoj, liveras konkursojn, reciprokas la kunlaborantojn per premioj, diskutas kun ili peraere, informas pri la Esperanto-movado, la aŭskultantojn klerigas helpe de muziko, literaturo kaj ne lastvice konigas al ili la vivon kaj historion de Pollando. La programoj estas tiom variaj, ke ĉiu povas elekti laŭ sia plaĉo.

Por mi, kursgvidantino, estas tiu ĉi realaĵo ne pritakseble grava, ĉar fininte la kurson mi scias, ke la kursanoj povas helpe de Radio Polonia trankvile daŭrigi sian evoluadon kaj ne forgesos ĉion ĝis komenco de la progresiga kurso. Necesas informi ilin pri tiu avantaĝo ankoraŭ dum daŭro de la kurso kaj atentigi ilin, ke dekomence ili malmulton komprenos pro la relative rapida anoncado, sed ke ili iom post iom ekkomprenos, ĉar la unuopaj komprenitaj vortoj ariĝos, kaj kreas tutaĵon, programeron, kiun ili kun plezuro aŭskultos. Malmulte da pacienco estas necesa kompare al kvanto da profito.

Unusola malfacilaĵo estas, ke oni devas lerni per multaj provoj kapti la stacion kaj konsciiĝi, kiu tempo kaj ondolongo favoras al la koncerna loĝloko. Ĝenerale en kamparaj domoj ne ekzistas malhelpoj, perturboj, dum en urboj la afero malpli simplas. Tamen la aŭskultado valoras ĉiun klopodon.

Oni ja tuj senerare rekonas, kiu kursano aŭskultas la disaŭdiĝojn, ĉar li nekompareble pli progressas ol aliaj kaj povas fariĝi perfekta. La geononcistoj de Radio Polonia havas agrablajn voĉojn, modelan prononcadon kaj kiam oni alkiutimiĝas foje por ĉiam al la rapideco, oni senprobleme komprenas ĉion kaj ĝuas la eblon esprimi per nia belsona lingvo la largan spektron de temoj disaŭdigataj. Al ĉiuj kursanoj, precipe al finstudintoj de skribaj kursoj, la aŭskultado ege gravas, sed ne nur al ili, ĝi same gravas por ni ĉiuj, por ke ni estu bone informitaj, kio okazas en Esperantujo.


## JUBILEA KONKURSO de RADIO POLONIA

Lige kun la 100-jariĝo de Esperanto RADIO POLONIA organizas konkurson kaj invitas vin al la partopreno. Samtempe oni petas popularigi la konkurson inter viaj geamikoj kaj samklubanoj. Por partopreni la konkurson sufiĉas respondi al nur unu demando:

- 1/ Kiaj pensoj venas al vi lige kun la 100-jariĝo de Esperanto, ĝisnuna aplikado kaj ankaŭ evoluo de ĉi tiu lingvo?
  - 2/ Kiagrade la kono de Esperanto ebligis al vi pli bonan ekkonon de la mondo?
  - 3/ Ĉu en via lando (urbo) oni faras ion por omagi la 100-jariĝon de Esperanto kaj se Jes, kion?
  - 4/ Kiel vi pritaksas la nunan staton de la lingvo, kiel ĝi devus evolui kaj kiaj estas viaj ĉi-koncernaj esperoj?
- La E-elsendoj de RADIO POLONIA akompanas la E-movadon ĉiutage de pli ol jarcentkvarono. Lige kun tio oni dezirus ekscii:
- 5/ Kion vi opinias pri la signifoj de la E-elsendoj de RADIO POLONIA por la E-movado kaj ilia rolo en la informado pri Pollando kaj kian signifon por vi persone havas ĉi tiuj elsendoj?
  - 6/ Kiaj estas viaj program-proponoj por estonteco? Kiujn temojn, program-ideojn indas realigi en niaj elsendoj en la plej proksima estonteco? Ĉu kaj se jes, kiel oni devus/oni povus pli vaste popularigi ilin en la esperantistaj medioj?

Sufiĉas respondi nur unu demandon por partopreni la konkurson. Inter ĉiuj partoprenantoj de la konkurso oni lotumos multe da E-aldonaĵoj, sonkasetoj kun la voĉo de Dr. Zamenhof, diapozitiv-seriojn kun E-tekstoj ktp. Krome la aŭtoroj de la plej interesaj konkursaĵoj ricevos aldonaĵajn premiojn i.a. en la formo de polaj popolartaĵoj. La respondojn oni sendu ĝis la 30-a de novembro 1987 al: Radio Polonia, Esperanto-Redakcio, 00-950 Varsovio, Box-46, Pollando - kun la kromnoto sur la koverto "ESPERANTO-KONKURSO". La rezultojn de la lotumado oni anoncos la 15-an de decembro 1987 en ĉiuj tiutagaj E-elsendoj de Radio Polonia.

# informoj



**NEVIDANTOJ.** La 16-an de majo okazis solena kunsido aranĝita okaze de la jubileo de la centra organo de la blindulorganizaĵo, "Zora" (fondita 1917, do antaŭ 70 jaroj). Oni invitis 3 reprezentantojn de la E-kunlaboro kun "Zora", s-anon J. Vychodil (red. de "Auroro"), s-anon R. Krchnák, Brno kaj V. Echtner, Domažlice. La redaktoro Vychodil bedaŭrinde ne povis veni, sed la ĉeestantaj invititoj havis okazon vaste raportii pri sia kunlaboro kaj Esperanto kaj ricevis multan atenton kaj rekonon.

**ŜAKISTOJ.** Okaze de la centjara Esperanto-jubileo la Esperanto-Ŝakluda Ligo aranĝis la XI-an Renkontiĝon en Poděbrady inter 3-a kaj 5-a de julio 1987. Partoprenis ĝin 35 gesamideanoj el Usono, Pollando, Hungario, Bulgario, Italio kaj Ĉeĥoslovakio. Inter ĉefaj punktoj de riĉa programo estis akcepto de la partoprenantoj en la urbo-domo kaj bapto de urba aleo al "Esperanto-aleo", kion faris vicprezidentino de Urba Nacia Komitato. Krom la ŝakturniro okazis ankaŭ ŝipekskurso kaj amuzvespero. En Poděbrady regis bonhumoro kaj amikeca etoso. Domage, ke pri la renkontiĝo havis malgrandan intereson la loka E-grupo kaj ankaŭ aliaj E-klubo. Ĉiuj partoprenantoj esprimis sian dankon al la organizinto s-ano L. Fiala. Ili esperas denove partopreni en la venonta XII-a Renkontiĝo.

(Václav Štěpánek)

**RADIO.** La radiostacio Ústí nad Labem elsendas ekde marto 1987 monatan informaron pri Esperanto en la programo Severočeský atlas (Nordbohemia Atlaso), ekz. 21.5. inter 15.30-16 h. Radio Praha elsendis 22.1.1987 en Kolotoč kontribuajon de Karel Kyr pri Fr. Vl. Lorenc. La sama stacio 26.5. matene informis pri la E-biciklado tra Ŝumava aranĝota de la klubo Aqualica.

(J. Mařík)



TELEVIDO. Interparolon pri Esperanto oni povis vidi en la dua programo de la Televido, la 15-an de aprilo, en la programo Vega. La informanto pri Esperanto estis Jan Ĥepa el Netolice. (J.M.)

LITERATURO. Post la volumo 153 de "KARAVANA", en kiu aperis romano "Timo sur la planedo Kvara", aperis en Prago en volumo 194 daŭrigo de la romano sub la titolo "Fremduloj sur la planedo Kvara" (112 pg.). Ĝi estas sciencfikcia romano pri alimondaj civilizacioj, de Ludmila Freiová. Ambaŭ romanoj estas en la ĉeĥa lingvo. - Sur la planedo KVARA estas Esperanto la internacia lingvo de kleruloj. Kaj ĝi estas proponata al vizitantoj el alia planedo (Eas). (J.M.)

SONDISKO. Nia popola kanto Maryša aperis, sub la nomo Marisa, inter 10 kantoj sur gramofona disko "Suzanna - per mia nura vol'" de la eldonejo Edistudio (Italio). (HdE, -jm.)

Max Laine pri ĈEA. Tiu ĉi esperantisto skribis en "Esperanto-Fervojisto", 448, marto 1987: "... mi staris en 'Jilská-Strato' apud la Esperanto-Domo. Ĝoje mi eniris. Ĉeestis du virinoj, sed neniu parolis en Esperanto! Mi afliktigis, ke Esperanto ne estas tre utila, se en Esperanto-Domo neniu scipovas Esperanton." - Ni povas nur aldoni: jes - tio estas eterna problemo de nia sekretariejo. (J.M.)

TERMINOLOGIAJ SEMINARIOJ. Ekde septembro 1987 estas en Praha aranĝataj terminologiaj klerigaj seminarioj pri jenaj temoj, nome:

- 1 "O české terminologii" (Pri la ĉeĥa terminologio) en 4 partoj, gvidanto estos Dr. Roudný, dum jenaj sabatoj: 26.9., 31.10., 28.11., 30.1.
- 2 "Terminologia kurso" en 4 partoj, gvidanto estos Ing. Werner, dum jenaj sabatoj: 26.9., 28.11., 27.2., 30.4.
- 3 "Konturoj de la lingvonormigo en la tekniko", en 5 partoj, gvidanto estos Dr. Kavka, dum jenaj sabatoj: 31.10., 30.1., 26.3., 28.5., 25.6.

Por la seminarioj ni volas uzi cambrojn en la Domo de Tehniko en Praha, ĉiam je la 9 - 12 h. Sciigu vian eventualan intereson pri la seminarioj al Ing. Jan Pospíšil, Lublanská 49, 120 00 Praha 2.

Gratulo al Bartošík. "Ĉlenský zpravodaj" 1/1987 de la Klubo filatelista en Praha OO-6 kaj revuo "Filatelie" n-ro 14 gratulas al nia membro Adolf Bartošík okaze de lia 80-jariĝo, pro liaj elstaraj sukcesoj en la filatelo kaj donas plenan supervidon pri lia ekspozicia aktiveco. Ĝis nun Bartošík aktive partoprenis en 32 ekspozicioj per la laŭtema kolekto "La historio kaj nuntempo de Esperanto" kaj en ses per la eksponaĵo "Jan Amos Komenský - la epoko, vivo, verko". - La ĵurioj atribuis al Bartošík 37 medalojn, el ili unu oran (Berlino, 1983), 12 orumitajn, 24 argentajn aŭ argentumitajn, kaj aldone 15 objekt-premiojn. La eksponaĵoj estis montrataj en GDR, PPR, BPR, Svedlando, Hispanio, USSR, en iuj kalkfoje. Ses el tiuj ekspozicioj estis tutmondaj aŭ internaciaj. Jen gratulinda ekzemplo de esperantista aktiveco! (Ni aldonu, ke kiel dua tiuspeca esperantisto en ĈSSR estas Vl. Vána en Plzeň.) (J.M.)

ESPERANTO DE LA REKONSTRUO. En la revuo "100 + 1 zahraniční zajímavost" (100+1 ali-landaj interesaĵoj), Praha, aprilo, n-ro 8/1987, aperis artikolo de Vladimir Simonov, politika komentisto de APN (Sovetunio), el kiu ni ĉerpas jenon:

Sur placo en Tallin, Estona SSR, la ĉefo de Sovetunio Miĥajl Gorbacov estis demandita de nekonata preterpasanto rilate instruadon de Esperanto en la lando. "Esperanto ja signifas fratecon, amikecon, reciprokecan komprenon..."

"Aĥ jes, esperanto!", ekvoĉis la statviro large ridetante. "Mi dirus proksimume jenon. Antau esperanto mi preferus unu aferon - la reconstruon. Kiam ĝi havos ĝin preta, ni alpasos ankaŭ al esperanto."

Konsenta ekmurmuro en la homamaso. La serco de la ĝenerala sekretario fontas el la realaĵo. La entuziasmaj realismaj debatoj pri la reconstruo de la soci-ekonomia vivo ..., tio estas hodiaŭ en Sovetunio, metafore dirite, nova esperanto, nova maniero de komprenigado inter la gvidantaro kaj la amasoj kaj ankaŭ inter ĉiuj 15 respublikoj. (Trad. J. Mařík)

## Agado E3

La dudekunujara porblindula organizo "Agado E3" intencas konstrui okulklinikon en Hindio, kie vivas centmiloj da kataraktuloj facile operacieblaj. - En Prago D-ro Horský forsendis jam milojn da malnovaj okulvitroj - donacojn de niaj samideanoj - al Afriko, kie ĝis nun Agado E3 disvolvas sian agadon.

## Bibliografio

Denove aperis Esperanto-ĉapitro en la granda jara bibliografio de la usona Asocio pri Modernaj Lingvoj (MLA), kiu ĵus aperis por la jaro 1985. La plej granda koncentriĝo de verkoj en kaj pri Esperanto aperas en la tria volumo (el entute kvin), en ĉapitro "Helplingvoj: Internaciaj lingvoj". La ĉapitro ampleksas 310 erojn pri Esperanto, ĉefe pri ĝia lingviko, kiuj estas detale analizitaj kaj indeksitaj (ioma kresko kompare kun 286 eroj en 1984). 1985 MLA International bibliography of books and articles on the modern languages and literatures estas konsultebla en ĉiuj ĉefaj esploraj bibliotekoj de la mondo.

## Afrika literaturo

Aperis la unua literatura verko en Esperanto el Angolo: "Brulo kaj rimo", poemaro de la fama poeto kaj angola ŝtatestro Agostinho Neto, en traduko de angolano Lutumba Tima. La tradukadon instigis E-klubo de Norrköping (Svedio), kadre de sia "afrikemela" agado; simile, la eldono rezultis el la kunlaboro de Vulpo-libroj (Nederlando) kaj Internacia Kultura Servo (Jugoslavio). La librolancon en Zagreb ĉeestis reprezentanto de la angola ambasadejo en Jugoslavio, kaj oni donacis la unuajn ekzemplerojn al jugoslavaj instancoj pri evolulandoj. ("Esperanto")

## Esperanto en ĉinaj altlernejoj

En 1986 sep ĉinaj altlernejoj decidis elekti Esperanton kiel duan fremdan lingvon nepre lernatan de tiuj esplorstudentoj, kiuj aspiras magistrecon. Ili estas la Centr-Ĉinia Instruista Universitato, la Hunan-a Universitato, la Orient-Ĉinia Instruista Universitato, la Hunan-a Instruista Universitato, la Hu-

bej-a Instruista Instituto, la Tjangin-a Fremdlingva Instituto kaj la Anhuja Universitato. ("El Popola Ĉinio")

## 20-lingva Muzeologia Vortaro

Hungara Esperanto-Asocio eldonis pli ol 800-paĝan fakon vortaron en 20 lingvoj. La unika verko aperis sub aŭspicio de UNESKO. Lingvoj de la vortaro (kiu havas 2000 fakesprimojn): angla, bulgara, ĉeĥa, dana, Esperanto, finna, franca, germana, hispana, hungara, itala, nederlanda, norvega, pola, portugala, rumana, rusa, serbo-kroata, slovakaj kaj sveda. (Budapesta Informilo)

## Fokuso - nova popularscienca periodaĵo

Fokuso estas daŭrigo de la periodaĵo Internacia Komputado. La plej ampleksa rubriko de Fokuso okupigas pri komputado. La unua 76-paĝa numero de Fokuso enhavas plurajn artikolojn pri mikroelektroniko (produktado de mikroĉipoj, bioelektroniko, duonpretaj cirkvitoj ktp.), mikrokomputiloj kaj komputilaj programoj (interalie pri la enkomputiligita versio de la "Fundamento de Esperanto" de L.L.Zamenhof). La pliampleksigon de la temaro reprezentas la rubrikoj pri ekonomiko kaj psikiatrio. Fokuso strebas prezenti la diversajn temojn en interesa formo kaj facile legebla stilo, kun multaj ilustraĵoj. (Budapesta Informilo)

## Esperantistoj en Nikarago

El la turmentata Nikarago samideanoj bezonas Esperanto-legaĵojn, revuojn, leterojn. Adreso: Nikaragva Esperanto-Asocio, Apartado 3912, Managua, Nikarago.

## Nova estraro de VPEA

La 25-an de oktobro 1986 en Hanojo okazis amasa esperantista renkontiĝo, ĉe kiu estis prezentita la nova Centra Komitato de Vjetnama Pacdefenda Esperantista Asocio, kies prezidanto estas la poeto Dao Anh Kha. Ĉeestis la kunvenon reprezentantoj de la Vjetnama Pakkomitato, kune kun tiuj de diversaj populorganizaĵoj kaj ŝtataj oficejoj.

La nova estraro de VPEA faris revuon de siaj aktivecoj, eldonis suges-

tojn al la asocia projekto por la venonta tempo kun la celoj disvastigi Esperanton en nia lando (precipe en Hanojo kaj en urbo Ho Chi Minh). Ĝi donis samtempe siajn planojn lige al la centjariĝo de Esperanto, pri la jubilea UK.

Prezidanto: Dao Anh Kha, ĵurnalisto kaj poeto,

Vicprezidantoj: Prof. Hoang Tue, filologo, direktoro de la Vjetnama Filologia Instituto;

Nguyen Duc Quy, publicisto, eksa vicministro pri kulturo;

Vu Can, ĉefredaktoro de "La Kuriero de Vjetnamio";

Le Tuyet Thanh, ĵurnalisto, vicdirektoro de la Oficejo por Eksteraj Rilatoj de Urbo Ho Chi Minh.

Ĝenerala sekretario: Nguyen Dinh Hien, publicisto, vicdirektoro de la Hanoja Fremdlingva Eldonejo.

Konstanta sekretario: Dang Dinh Dam.

Inter la 8 komitatanoj estas kaj verkistoj kaj pentristo kaj lingvistino kaj ingeniero.

(Dang Dinh Dam en Budapeŝta Inform.)

#### Speciala poŝta stampo en Hungario

Dank' al iniciato de la Poŝtista Fakkomisiono de Hungara Esperanto-Asocio, la Hungara Poŝto uzos specialan poŝtan stampo okazante de la 100-jariĝo de Esperanto. La automata stampilo kun dulingva tekstofunkcio dum la dua duonjaro de la Jubilea Jaro en la tre grava budapeŝta poŝtofocejo n-ro 72-a, de kie startas ĉ. 80 % de la leteroj senditaj el la ĉefurbo de Hungario.

#### Tri Esperanto-aŭtoroj slovaklingva

En Ľudové noviny, semajngazeto de la hungarlandaj slovakoj, aperis la 15-an de januaro noveleto "Puto" de István Nemes en la traduko de O. Knichal. Jam aperis tie de la sama tradukinto "Falsa profeto" de Sándor Szathmári kaj tri ĉapitroj el la famaj porjunulara "Kamezusa, la filo de la gangalo" de Tibor Sekelj. O. K. tradukis en la slovakon jam plurajn verkojn ankaŭ el la hungara.

#### 28-a Hungara Esperanto-Kongreso

La solena malfermo de la 28-a Hungara E-Kongreso okazis en la Kongresa Halo de la Parlamentejo. Plenplena salono (580 personoj), Jubilea etoso, festparolo de d-ro Vilmos Sághy, emerita ministro, prezidanto de HEA, enkondukis tiun ĉi neforgeseblan solenaĵon. En la prezidio de la solena malfermo sidis reprezentantoj de gravaj sociaj organizaĵoj, kiel Hungara Socialisma-Laborista Partio, Landa Konsilio de Sindikatoj, Landa Konsilio de Virinoj, Muzeologia Centro, Ministerio pri Klerigo, Ligo de Teknikaj kaj Natursciencaj Societoj, Landa Paĉkonsilio, Landa Konsilio de Kooperativoj, Komunisma Junulara Asocio, Asocio por Disvastigo de Natursciencaj Konoj, Asocio de Hungaraj Naturamikoj k. a. Okaze de la Jubilea Jaro la Hungara Esperanto-Asocio ricevis la 4-an plej altan honorigon de la Hungara Popolrespubliko "Ordenon de Paĉo kaj Amikeco". János Kádár, ĉefsekretario de la Hungara Socialisma-Laborista Partio sendis salutleteron al Hungara E-Asocio.

(Budapeŝta Informilo)

#### Konsilantaro de Eŭropo aprokis UEA

Universala Esperanto-Asocio lastatempe ricevis konsultan statuson ĉe la Konsilantaro de Eŭropo, laŭ deklaro publikigita de la Ĝenerala Sekretario de la Konsilantaro en Strasburgo, Francio. La Konsilantaro de Eŭropo estas kunlabora organizo, en kiu membras la plimulto de la landoj de suda kaj okcidenta Eŭropo. Konsulta statuso rajtigas UEA-n komenti pri demandoj sur la tagordo de la Konsilantaro kaj partopreni la debaton pri la politiko de la Konsilantaro. La deklaro de la Ĝenerala Sekretario ekvalidigis la 13-an de aŭgusto 1986.

(Budapeŝta Informilo)

#### Tutlanda renkontiĝo de Koreaj e-istoj

En plena sukceso finigis la tutlanda renkontiĝo de Koreaj esperantistoj, kiu okazis de la 23-a ĝis la 26-a de januaro en urbo Taegu sub la aŭspicio de tiea filio de KEA. Entute partoprenis 68 gesperantistoj kun la gvidantoj, s-ro Joel Brozovsky el Usono, s-ro Ma

Young-tae, Ho song, Pak gi-wan kaj s-ino Lee hyon-suk. Okulfrapa partoprenanto estis F-ino Dina Trapp, la profesoro de angla lingvo en Universitato Pusan kaj la kredanto de Bahai, kiu lastatempe sklernis Esperanton kaj montris surprizan kapablon de nia lingvo. S-ro Joel Brozovak, nun vojaĝanta Koreion, gvidis la kurson de konversacio, kiu estis tre efika por progresintoj. Okazis ankaŭ lekcioj; s-ro Kwak Jeung-hun, la cefo de filio Taegu, faris lecion pri la historio de Korea Esperanto-movado, kaj s-ro Lee Jung-ki pri la nuntempa situacio de monda Esperanto-movado.

("La Espero el Koreujo")

#### Esperanto por Olimpikoj 1988

KEA klopodas nun trovi ciujn rimedojn por apliki Esperanton al Olimpikoj, kiuj okazos en Seulo en la jaro 1988. KEA jam komencis kolekti necesajn materialojn koncerne tiun problemon precipe el la landoj, en kiuj Olimpikoj jam okazis. Bonvolu sendi la necesajn kaj concernajn dokumentojn kaj materialojn al la oficejo de Korea Esperanto-Asocio (C.P.O. Kesto 4258, Seulo, Koreio).

#### Simultana Esperanto-kurso en Korejo

Okazis simultana Esperanto-kurso por komencantoj en 9 urboj ekde la 14-a de januaro dum unu monato. Pri la okazo anoncis multaj tagjurnaloj, televidaĵ kaj radio-stacioj. Entute c. 270 personoj sukcese finis la kurson. Por disvastigi Esperanton, Korea Esperanto-Asocio regule aranĝas la simultanan kurson en ĉiuj somer- kaj vintro-ferioj en 9 urboj, kie troviĝas la filioj de KEA.

("La Espero el Koreujo")

#### Al ministro pri Esperanto

Por vekti la intereson kaj neceson pri la internacia lingvo, s-ro Han Moo-hyop, la eldonanto de "La Espero el Koreujo", renkontis la ministrin de la eksteraj aferoj, Choi Gwang-soo, kaj lin akompanis s-ro Lee Jung-hi, la gen. sekretario de KEA. En la kunsido s-ro Han emfazis la enkondukon de neutrala lingvo por solvi la lingvan problemon en internacia kampo, kaj petis la politikan subtenon en la aferoj de internacia lingvo. Li

proponis, ke oni instruu Esperanton al la koreaj diplomatoj, kiuj estas laborantaj en eksterlandoj. La ministro Choi kun la favoro al Esperanto promesis pozitiva pristudi la problemon.

("La Espero el Koreujo")

#### Britio tostas la jubileon per E-vino

Je la 15-a de decembro 1986 en Klubo "Peruko kaj Plumo" en Strand, Londono, oni lanĉis Esperanto-Vinon honore al la Jubileo de Esperanto en 1987. La vino estas blanka angla vino farita el vinberoj kultivitaj en Anglio kaj la boteloj portas Esperantajn etiketojn desegnitajn de Peter Oliver, membro de la Brita Organiza Komitato por la Jubileo.

("Voĉo de Handikapuloj")

#### Internacia Konferenco "Esperanto en Profesio"

kaj Dua Internacia Scienca Esperanto Seminario pri Kosmaj Esploroj

okazos de la 16-a ĝis la 20-a de oktobro 1987 en la urbo Vraca - unu el la plej viglaj centroj de la Esperanto-movado en Bulgario. Ili estas dedicitaĵ al la Jubileo de Esperanto. Kiu ne povas ĉeesti persone, tiu povas partopreni korespondes: oni prezentos senditan prelegon kaj poste aperigos ĝin en specialaj libroj de la Konferenco kaj la Seminario.

La unua arango klarigos la aspektojn kaj la problemojn de la uzo de nia, jam centjara lingvo en la profesia agado, kaj la dua montros kiel Esperanto povus esti uzata en la laboro de fakuloj pri kosmaj esploroj. Funkcio de speciala sekcio pri scienc-fikcia literaturo kaj arto.

La programo pliriĝigos per kelkaj eroj: ekskursoj al la ĉefurbo Sofio kaj la urbo Belogradcik, koncerto en la groto "Ledenika", teatra spektaklo en Esperanto, renkontigo kun la loka esperantistaro. Koresponda adreso: Esperanto, p. k. 66, BG-3000 Vraca, Bulgario.

#### Esperantologio en la nacia lingvo

En Jugoslavio aperis du nacilingvaj verkoj temantaj pri Esperanto:

Petro Stojan: "Porijeklo i život

BRNO. El la lastatempaj programoj speciale ni citas:

La 12. 5. prezentis Eva Seemannová, Prago, en la kadro de nia programo "Versojn kaj monologojn" de Eli Urbanová kun granda sukceso.

La 26. 5. okazis solena koncerto omage al la centjarigo de Esperanto sub artisma gvido de Helena Supová-Halířová kaj artistoj el la Ŝtata Teatro de Brno. Tre-ege sukcesinta vespero kun belega programo kaj maksimuma vizito. La ege kontenta samideanaro longe ovaciis la artistojn.

La 2. 6. parolis enkadre de la klubvespero poeto Jiří Karen pri la temo: "Kial Esperanto?" Tre interesa parolado, post kiu sekvis diskuto.

Aldone: Pluraj ĵurnaloj de Brno relative ofte eĉ amplekse raportas pri Esperanto. Ĉefe Svobodné slovo kaj Brněnský večerník. (J. Vondroušek)

HAVÍŘOV. La loka E-grupo rememoris en aprilo per prelego de prez. Zdeněk Heiser la lastajn tagojn de Zamenhof ce okazo de la 70-jara datreveno de lia morto. S-ano Brzoska rakontis pri sia partopreno ce la paca konferenco en Pardubice kaj poste li aŭdis sian surbendigon de radioelsendo, okazinta je la tago de 80-jarigo de poeto Jiří Kořinek. En la klubanoj aŭskultis rakontadon de s-ano Holan pri Split kaj ĉirkaŭaĵo, kun belaj diapozitivoj. (Ast.)

OLMOUC. La 2-an de majo aranĝis Esperanto-klubo en Olomouc solenan kunsidon, kadre de 75-a jubileo de la klubo kaj centjarigo de Esperanto. La solenan aranĝon partoprenis preskaŭ 120 gesamideanoj el 18 lokaj kluboj kaj urboj el Bohemio kaj Moravio kaj polaj gastoj el gemelurboj Gliwice kaj Bielsko-Biala. Ĉeestintoj ankaŭ vizitis faman ekspozicion de floroj "Flora Olomouc 87" - printempan etapon.

Dum solena posttagmezo en Geisler-salono de Parko de kulturo kaj ripozo oni prezentis rican kulturprogramon: kantis, ankaŭ en Esperanto, vira kantaĵo "Haná", kaj akrodinstrumentsa kvarteto, gvidata de s-ano Jan Duda, membro de Moravia filharmonio, prezentis kelkajn famajn komponaĵojn. Post festparolado sekvis rica diskuto de la gastoj.

VÍTKOVICE. Printempan promenen tra naturo, situata tuj apud la urba industria centro, aranĝis esperantistoj de EK Vítkovice dimance la 26-an de aprilo. La celo de promeno estis montareto Landek super kunfluejo de riveroj Odra kaj Ostravice. Sur ĉi tiu loko oni malkovris unuan Ostravan nigran karbon, de ĉi tiu loko, kie estas konservita la plej malnova Ostrava minejo, ekmarŝis sian triumfan marŝon la industria revolucio en nia regiono. Hodiaŭ sur montareto Landek disetendis arbareto, silenton nenigis triloj de kantbirdoj kaj pasinteco rememorigas nur restoj de ekspluatado, kiujn oni povas vidi dum promenado de tempo al tempo en la arbareto.

La promenen partoprenis pli ol dudek klubanoj kaj al plena sukceso kontribuis ankaŭ bela vetero.

Sabate la 9-an de majo aranĝis EK Vítkovice jam trian fojon komunan viziton por gepatroj kun infanoj en Ostrava zoologia bestarejo. Fakan kaj informplanan komentaĵon faris dum la trarigardo profesia bestbredisto s-ano P. Grun, kiu ebligis al la ĉeestantoj enrigardi ankaŭ la postkulisejon de la zoologia bestarejo. Ĉiuj plenkreskuloj kaj infanoj (sume 32) akiris novajn impresojn, sciojn, spertojn kaj travivaĵojn. (Ing. Radim Surý)

PRAHA. La 1-an de junio 1987 la vespera kunveno de Esperantista Klubo en Praha estis dedikita al la rememoro pri la antaŭa Universala Kongreso en Varsovio, en la jaro 1959. La partoprenantoj de la rememorado, la iamaj membroj de Verda Ĉaro de Julio Baghy - Eva Seemannová (Eliza), Eva Řiháčková (sinjorino Higin), dr. Pravoslav Sádlo (profesoro Higin) kaj Jindřich Ondráček (kolonelo Pickering) - tralegis partojn el la teatraĵo Pigmaliono, kiun ili prezentis antaŭ 28 jaroj en Varsovio.

# KONVERSACIO por progresintoj



Deka temo: VETERO KAJ KALENDARO

La vetero alternas laŭ la jaraj sezonoj. Somere estas plej ofte varme. La temperaturo estas ĉiam super nulo, kiel montras la termometro. Numeron montras alkoholo aŭ hidrargo en la vitra tubeto aŭ montrilo de aneroido. La bazo de termometro estas en tio, ke per varmigo la materioj plilongigas aŭ plivestigas. Tial oni konstatis la temperaturon en du gravaj kazoj de la akvo: kiam ĝi komencas frostiĝi kaj boli. La diferencon oni dividis en cent gradoj de temperaturo. Somere oni ŝatas bani sin, duŝi aŭ pluvbani kaj sunbrumiĝi. Se ne estas vento, la vetero iĝas baldaŭ sufoka, oni multe ŝvitas. La sufoko sekvigas plej ofte ŝtormon aŭ fulmotondron. La fulmoj zigzagas sur la firmamento, pluvigas multe eĉ torente, tondras kaj hajlas. Hajlo estas grajnoj de glacio, kiuj povas konsiderinde damaĝi la rikolton. La fulmoj trafas altajn objektojn. Tial oni konstruas sur la tegmentojde domoj aŭ turoj fulmosirmilojn. Post mallonga ŝtormo oni sentas ozonon en la pura aero. La ŝtormon alportas vento, kiu estas movado de aero. La varma aero ŝvebas supren, anstataŭ ĝi pelas la malvarma aero siajn tavolojn. La firma tero pli rapide varmigas kaj malvarmigas, krome diversaj partoj de la terglobo ne estas same varmigitaj. Tiel ekestas regulaj ventoj, tradoj en Afriko, musonoj en Azio. Krome estas neregulaj ventoj, kiuj akompanas la ŝanĝon de vetero aŭ ŝtormon. Tre ofta ventego nomiĝas uragano, en diversaj landoj ĝi havas specialajn nomojn, ekzemple en Japanio tifono aŭ tajfuno, aliloke mistralo, blizardo, borao ktp. Trombo estas vento, kiam la aero kirlas en cilindra kolono. La forto de la vento estas grandega, sed kaprica. La homoj eluzas ĝin per velŝipoj aŭ en ventmueliloj.

Aŭtune venadas pli oftaj pluvoj kaj veteraĉoj. Super akvoj, herbejoj kaj arbaroj leviĝas nebuloj. Sur la tero aperas matene roso, pli poste en aŭtuno prujno. Vintre frostas, sur la akvoj aperas glacio, la tero estas kovrita de neĝo. Oni povas praktiki vintrajn sportojn kaj konstrui neĝfigurojn. Glacio kaj neĝo estas frostiĝinta akvo, kiu tiel solidiĝis, se daŭre estas temperaturo sub nulo. Printempe la glacio kaj neĝo degelas. El la degelinta neĝo kaj glacio povas esti superakviĝoj kaj inundoj. Sur akvoj aperas glaciablokoj kaj glacifrakasaĝoj. En montaroj estas tre dangeraj lavangoj, nome amasoj da neĝoj, kiuj povas rapide torenti en valojn kaj superŝuti vojojn kaj homojn. La vento povas amasigi grandajn neĝblovaĵojn, iam venas eĉ ŝtormo kun neĝo.

La alternado de la kvar jarsezonoj estas konsekvenco de la deklinita tera akso. Tiu estas deklinita al la tera orbito, la angulo estas ĉirkaŭ 66 gradoj. Tial al la suno estas somere altturnita norda duonglobo aŭ hemisfero, dum vintre ĝi estas forturnita. La sunaj radioj venas al la tera surfaco en diversaj anguloj. Somere la angulo estas pli granda, preskaŭ orta, vintre ĝi estas malgranda. Ju pli grande la angulo estas, des pli multe da radioj varmigas la teron. Sed la kvar jarsezonoj estas en la aliaj partoj de la tera surfaco

pli aŭ malpli diferencaj, en la suda hemisfero ili estas tute inversaj. La aera atmosfero ĉirkaŭ nia terglobo efikas, ke la ŝanĝoj de la temperaturo ne estas subitaj kaj grandaj, kiam la suno subiras kaj leviĝas. Tial oni distingas ne nur tagon kaj nokton, sed ankaŭ tagiĝon kaj matenon, krepuskon kaj vesperon. Nokte la tero malvarmiĝas, sed ne tiom, kiam ekzemple tie, kie la aero estas malpli densa.

La vetero de certa regiono estas karakteriza, ĉar ĝin influas la pozicio sur la terglobo, la alteco, la najbareco de grandaj akvoj kaj la ofta direkto de ventoj. Tiam oni parolas pri la klimato de koncerna regiono.

La veteron oni profetas laŭ diversaj naturaj simptomoj, kiel ĉielruĝo, nebuloj, nuboj aŭ science laŭ la observado de termometro, barometro, higrometro kaj forto de vento. La barometro mezuras la premon de la aera tavolo, kiu estas super la tera surfaco. La higrometro mezuras kvanton de vaporoj aŭ akveroj en aero. La scienco pri la vetero nomiĝas meteorologio. La profetado de vetero estas grava por multaj profesioj. La meteorologion multe helpas artaj satelitoj, balonsondoj kaj meteorologiaj stacioj situantaj en lokoj, kie oni normale ne loĝas.

La jersezonoj alternas dum unu jaro, dum kiu nia Tero faras unu cirkulon ĉirkaŭ la Suno sur sia orbito. Tiu ĉi jaro estas dividita en dekdu monatoj, kiuj estas derivitaj el ŝanĝoj de la luno sur la firmamento. La tago estas la tempo, dum kiu la tero unufoje rotacias ĉirkaŭ sia akso. La semajno havas sep tagojn. Unu jaro ne havas entjeran nombron de tagoj, nome la cirkulo daŭras proksimume 365 kaj kvarono de tagoj, tial ekzistas jaroj kun 365 tagoj kaj superjaroj kun 366 tagoj. Analogie estas diferenca nombro de tagoj en unuopaj monatoj. La tuto nomiĝas kalendaro, kiun oni ĉiujare eldonas en formo de libro, folio aŭ ŝirbloko. Eterna kalendaro, kiam ĉiuj tagoj havas la saman daton kaj enkaŭ la saman semajnan tagnomon, estas ĉiujare revo. La kalendaro evoluis longdaŭre laŭ astronomiaj observadoj de suno kaj luno. Oni strebis harmoniigi ambaŭ observadojn kaj konstatis, ke la reduktoj inter nombroj ne estas entjeraj nombroj.

La tago estas dividita en 24 horoj. Sed ĉar la hela parto estas enkaŭ tago, do oni preferas en tiu senco diri: diurno. Ĉiu horo havas sesdek minutojn po sesdek sekundoj. La mekanismo, kiu montras la diurnan tempon, nomiĝas horloĝo. Ties ĉefa parto estas pendolo aŭ risorto, kiu rotaciigas diversajn dentajn radojn kaj fine du aŭ tri montrilojn sur ciferplato. Aliaj sistemoj estas sunaj, sablaj, akvaj kaj elektraj horloĝoj aŭ rektaj numeriloj de horoj, minutoj kaj sekundoj, nomataj digitalaj horloĝoj. Specialan destinon havas vek-kaj stophorloĝo. En la meza epoko oni konstruis astronomiajn horloĝojn, kiuj kunigis mezuradon de diurna tempo kun kalendaro kaj kun aliaj astronomiaj fenomenoj.

La ĉefa punkto de diurno estas tagmezo kaj noktomezo. La noktomezo estas komenco de la nova tago, kiu havas alian daton kaj nomon. La tagmezon oni certigas laŭ kulminiĝo de la suno. Sed en ĉiuj lokoj de la terglobo ne estas tagmezo en la sama momento. Por eligi konfuzojn oni fiksas 24 zontempojn, kiuj validas en certa teritorio, kies formo estas proksimume sfera duangulo kaj kiuj diferenciĝas de la najbaraj je unu horo. Kaj ie sur la tera surfaco ekzistas eĉ data linio.

En la nuntempa kalendaro estas ĉiu tago iel festotago aŭ nomtago. En ĝi estas ankaŭ limtempoj aŭ terminoj. La jaro estas signita per numero, kiu komenciĝas ekde certa okazaĵo eĉ mita. Ekzistas diversaj eraoj, sed ĝenerale oni nun uzas eraon ekde kaj antaŭ naskiĝo de Kristo. Kiu volas eviti la nomon de Kristo, tiu diras: antaŭ nia erao, dum nia erao. La numero de la jaro en certa erao estas jarindiko. Epoko estas nepreciza tempo, pli longa ol unu jaro, kiu estas grava historie aŭ socie. Jaroj kuniĝas al jardekoj, -centoj kaj -miloj. Periodo estas tempodaŭro inter du difinitaj fazoj de fenomeno aŭ evoluo. La geologio estas scienco, kiu esploras la ekeston de la Tero kaj la evoluon en la praepoko. La sciencistoj dividis tiun pretempon, en kiu ili observis nur efikadon de naturaj fortoj, en kvin periodoj: azoa, primara, sekundara, terciara kaj kvaternara. Tiuj periodoj, dum kiuj ekestis diversaj formacioj de la tera surfaco, estas poste pli detale kaj pli precize dividitaj.

GRAMATIKO: 1/ Trovu frazojn kun konjunkcioj: **ju- des**. Skribu dek aliajn ekzemplojn. 2/ Skribu dek destinojn de taga tempo aŭ de dato.

STILO: 1/ Skribu nomojn de monatoj, diru pri ĉiu, kiom da tagoj ĝi havas. 2/ Skribu nomojn de tagoj, diru, kiam oni laboras, kiam estas ripozo.

DEMANDOJ: 1/ Kiam vi naskiĝis? 2/ Nomu dek datojn kaj diru okazaĵojn al tiuj datoj. 3/ Kiu festotago ne havas fiksan daton? Kion vi povas diri pri tiu ĉi festotago? 4/ Kion vi scias pri la eterna kalendaro? 5/ Kio sekvas el la fakto, ke la cirkulo de la tero ĉirkaŭ la suno estas precize 365 tagoj 5 horoj 48 minutoj 46 sekundoj? Ĉu vi aŭdis pri gregoriana kaj juliana kalendaroj?

FORMULO:  $X = T + \frac{M}{100} + \frac{J}{1000} + \frac{C}{10000} - 2,2$

T...tago /dato/ M...numero de monato J...du lastaj ciferoj en la jarindiko C...du unuaj ciferoj en la jarindiko /jarcentoj/.

Dividante oni ne atentu restojn, oni kalkulu nur kun rezultoj. Sed kiam oni elkalkulas la numeron X, oni ĝin dividas per 7. Kaj en tiu divido decidas resto: 0-sabato, 1-dimanco, 2-lundo, 3-mardo, 4-merkredo, 5-ĵaŭdo, 6-venredo.

Ne forgesu: januaro kaj februaro estas 13-a kaj 14-a monatoj de la antaŭa jaro.

Ekzemplo: dato la 20-an de novembro 1986. Oni skribas: 20.11.1986. Sed tian daton ne volas komputiloj. Supre oni parolis pri numeriloj, kiuj estas tiel ordigitaj, ke plej rapide varias la lasta cifero, ties variado sekvigas la ŝanĝon de la antaŭa cifero kaj tiel plu. Sed en kazo de la dato skribita 20.11.1986 varias tute alia cifero. Tiel la komputiloj preferas daton en tiu formo 19861120 aŭ 1986.11.20. Sed kiel ajn la dato estas skribita, por la formulo estas jenaj numeroj:

T 20 M 11 J 86 C 19. Oni substituas en la formulo:

$X = 20 + \frac{11}{100} + \frac{19}{10000} = 20,1119$

$X = 20 + \frac{112}{1000} = 20,112$

$X = 20 + \frac{1119}{10000} = 20,1119$

$X = 124$

$124 : 7 = 17$

54

5

En lasta divido konstatu la reston 5 /ne la rezulton 17/. El ĝi sekvas, ke 1986.11.20 estas ĵaŭdo.

Pruvigu mem la ĝustecon de tiu formulo por la eterna kalendaro.

(Josef Chvosta)





# KORESPONDI DEZIROJ ANONCOJ

Flegistino 39-jara deziras korespondi kun e-istoj de tuta mondo pri turismo, vojaĝoj, radiestesio, art-arkitekturo. Si logas en la populara ripozloko de Pollando, do si povus invitadi esperantajn gastojn. Ŝia adreso: Irena Kamińska, ul. Radomska 12, 78-100 KOŁOBRZEG, Pollando.

Instruistino 22-jara volas korespondi, si interesigas pri Esperanto, muziko kaj turismo. Adreso: Grażyna Zawada, Os. Dolnośląskie 130/7, 97-400 BELCHATÓW Pollando.

Ingeniero 54-jara interesigas pri turismo, historio - speciale antikva historio kaj arĥeologio. Adreso: Marek Migurski, ul. Czajki 21/12, 44-114 GLIWICE, Poll.

19-jara lernanto de Elektronika Teknikumo deziras ligi korespondadon kun amikoj el Ĉeĥoslovakio. Li interesigas pri turismo, elektroniko kaj muziko, satas vojaĝojn kaj montaron, kolektas bildkartojn. Adreso: Dariusz Pysiak, ul. Robotnicza 16/1, 26-600 RADOM, Pollando.

Pola lernanto interesigas pri turismo, literaturo kaj belaj artoj, kolektas pentraĵojn kaj desegnaĵojn. Adreso: Bogusław Trzęsalski, Zagaż, 88-220 gm. Csięciny, woj. Włocławskie, Pollando

17-jara knabino deziras korespondi kun knabino aŭ knabo en Esperanto. Adreso: Barbara Krzystanek, ul. Cedlera 13/7, 41-200 SOSNOWIEC, Pollando.

25-jara studento volus korespondi esperante kun interesaj homoj pri diversaj temoj. Adreso: Mieczysław Szydłowski, ul. Ogródowa 5/4, PL-65-461 ZIELONA GORA, Pollando.

Laboristo 29-jara interesigas pri turismo, junulara muziko, fotoarto, baĥeto, filmo. Adreso: Gregor Wienę, ul. Dworcowa 5/9, 62-005 OWIŃSKM, Pollando.

18-jara studento, kiu finis liceon kaj volus fariĝi tradukisto. Li interesigas pri muziko, literaturo kaj fotoarto. Mariusz Gornicz, str. Jankowska 3m99, 02-129 Varsovio, Pollando.

Instruistino 25-jara interesigas pri turismo, literaturo. Adreso: Gosława Grabowska, str. Mickiewicza 2/31, 59-300 LUBIN, Pollando.

Oficistino 37-jara interesigas pri turismo kaj folkloro. Adreso: Jolanta Ostrowska, ul. Powst.Wkp. 7/23, 62-510 KONIN, Pollando.

Instruistino 30-jara interesigas pri turismo, literaturo kaj folkloro, kolektas bildkartojn, etiketojn kaj prospektojn. Adreso: Urszula Mokrzycka, Pl-48-256 BIEDRZYCHOWICE 165, W.-Opole, Pollando.

Komencantaj esperantistoj el Kievo, kiuj finis printempe kurson gviditan de Svetlana Pogorełaja volonte ekkorespondos kun gesamideanoj el la tuta mondo. Ni proponas amikan korespondadon kaj porpacan kaj poramikcan kunlaboron. Skribu al la adreso de la instruistino: Soveta Unio, SU-252035, KIEV - 35, ul. Urickogo, d. 19, kv. 73.

Okaze de la centjarigo de Esperanto, la 15-jara Juna Koro Esperanto-Klubo letervesperon aranĝos la 25-an de septembro. Ni atendas esperantlingvajn bildkartojn por demonstri al la oficialaj organizaĵoj (al la Urba kaj Departementa Konsilantaro, al la Sindikatoj) la disvastiĝon de Esperanto. Ni bezonas ankaŭ vian salutkarton! Skribu tuĝ! Dankon. Adreso: Juna Koro, H-8900 ZALAEGERSZEG, Pf. 263. Hungario.

Hungara lernantino volus korespondi kun lernantino de sesa klaso: Éva Szűts, Toborzó ú. 27, 5100 JÁSZBERÉNY, Hungario

Projektanto 46-jara deziras korespondi kun esperantistoj-abelbredistoj. Adreso: Fabián Mihály, Carti Nr. 3, Mures, 3280 SIHGEORGIU DE PÁDVRE, Rumanio.

Korespondi kun esperantistoj de ĉiuj landoj volas: Roberto Paez Campo, Av. 19 / 2610, Quivicán, HABANA, Cuba.

Korespondi franclingve deziras:  
Fahd Ballans Mohamed, Quartier RAIT Rue  
5 N<sup>o</sup> 46, Cite Mohamadi, CASABLANCA (05),  
Maroc.

Kramti Badreddine, Cite gare N<sup>o</sup> 4,  
2120 REDEYEF, Tunisie.

BADI Mustapha, Avenue du plage Bloc "B"  
N<sup>o</sup> 8, Sidi Ifni, Maroc.

Abdellah Nahime, AV, palestine, N<sup>o</sup> 3,  
Cite lalla Maryem, Sidi Ifni, Maroc.

Elkhattart Aziz, N<sup>o</sup> 1 Rue rif oued el  
Bacha, SAFI, Maroc.

Membroj de la pionira organizo "Ernst  
Thälmann" de la ercmontara subdistrikto  
Stollberg intencas instali instruan vo-  
jeton "Sur la spuroj de stonkarba min-  
ekspulato". Tiu ĉi vojeton inkludas mal-  
novajn minejojn, sutmontojn, la domon de  
la fondinto de la unua minejo kaj aliajn  
historiajn kaj geografiajn vidindaĵojn.  
Por la vizitantoj de la vojeton estas el-  
donata speciala poŝtkarto kaj ankaŭ in-  
formmaterialo Esperanta. Oni planas pre-  
tigi la vojeton ĝis la VIII. Nacia Pio-  
nira Renkontigo '88, okazonta en la  
distrikto Karol-Marx-Stadt. Adreso:  
Dipl.-Phil. Christian Papezmeier,  
DDR-9156 OELSNITZ, Obere Hauptstrasse 104

Alvoko por internacia arta konkurso "Ni  
infanoj satas la pacon" kaj "Konservu la  
pacon por infanoj"

En aŭgusto 1988 okazos en la urbo Karol-  
Marx-Stadt la VIII-a renkontigo de la  
pionir-organizaĵo "Ernst Thälmann". La  
membroj de tiu infana asocio de GDR do-  
kumentos, kiamaniere ili partoprenas la  
batalon por paco kaj amikeco inter la  
popoloj. La distrika junulara sekcio  
Karol-Marx-Stadt de GDREA volas kontri-  
bui al la preparo de tiu renkontigo. Pro  
tio ni alvokas ĉiujn artistajn esperan-  
tistojn (hobiajn aŭ profesiajn) parto-  
preni nian internacian artan konkurson.  
Konkursaj kondiĉoj:

I Temoj kaj aĝaj klasoj  
Oni povas sendi artajn verkojn de ĉiuj  
specoj: pentroarto, grafiko, skulpturo,  
fotografio k.t.p. La kadraj temoj estas:  
por infanoj ĝis 14 jaroj - "Ni infanoj  
satas la pacon"

por junuloj kaj plenkreskuloj - "Kon-  
servu la pacon por infanoj"

II Sendado de la verkoj  
Ĉiuj kontribuoj por la konkurso devas  
esti senditaj ĝis la 15-a de aprilo  
1988 al la prezidanto de la junulara  
sekcio Karol-Marx-Stadt de GDREA:  
Dipl. Phil. Christian Papezmeier  
Obere Hauptstrasse 104

Oelanitz, DDR-9156  
Nepre aldonu la precizan adreson kaj  
la poŝtkartadon!

III Ekspozicio

Ĉiujn recenzitajn verkojn ni montros  
dum la VIII-a renkontigo de pioniroj  
en Karol-Marx-Stadt. Post tiu arango ni  
uzos la verkojn por pluj ekspozicioj  
en kadro de GDREA. Resendado nur en  
esceptaj kazoj eblas.

IV Premiado

Ĉiu konkursanto ricevos diplomon. La  
plej bonajn verkojn (kiujn elektos spe-  
cialistoj) ni premios per  
- filatelistaj suveniroj de VIII-a pi-  
onira renkontigo  
- bildalbumoj de Karol-Marx-Stadt  
- insignoj kaj aliaj laboraj objektoj.  
Ni petas ĉiujn arte laborantajn esperan-  
tistojn partopreni multnombre kaj kre-  
ative tiun internacian konkurson.

La membroj de la distrikta junula-  
ra sekcio Karol-Marx-Stadt de GDREA

Ĉiulandaj Pacopropagandiloj serĉataj

Samarkanda Esperanto-klubo de Interpo-  
pola Amikeco daŭre kolektas Ĉiulandajn  
kaj Ĉiulingvajn porpacajn plakatojn,  
flugfoliojn, fotojn, (infan)desegnaĵojn,  
librojn, revuojn, ĵurnalojn, lumbildojn,  
insignojn, gluaĵfoliojn, poŝtmarkojn,  
ĉiujn ceterajn pacpropagandilojn. La ma-  
terialoj estas serĉataj por la jam tra-  
diciaj internaciaj porpacaj ekspozicioj.  
Bonvolu adresi ĉion al: INTERKLUBO  
"ESPERANTO", SU-703000, SAMARKANDO  
GLAVPOCTAMT, abon.ja. 76, UZBEKISTANO,  
USSR.

Respondo kaj laŭdezira rekompenco garan-  
tiata. Validas ĉiam. Represo kaj naci-  
lingvaj anoncraĵoj petataj. Antici-  
pajn dankojn al ĉiuj kontribuantoj!

# el la sekretariejo

## Vyhodnocení soutěže

Komise pro tisk a informace a vedení ČES vyhodnotila jako neaktivnějšího příspěvatele o esperantu do čs. tisku za první čtyři měsíce t.r. Emila Egnera z Českých Budějovic. S-ano Emil Egner publikuje v Jihočeské pravdě pravidelně články o esperantu. Jeho příspěvky se vyznačují aktualností, vysokou informovaností a profesionalitou.

Navíc s-ano Emil Egner spolupracuje s jugoslávským měsíčníkem ZET, který vychází v Záhřebu. Nejoblíbenější je stránka zajímavostí ze světa. Redakce tyto zprávy získává ojedinělým způsobem - od esperantistů různých zemí. Z esperanta je pak překládá do srbochorvátštiny. I mezi neaktivnějšími příspěvateli tohoto časopisu patří Emil Egner. (KK)

## Proč přes ČEDOK do Varšavy?

V září 1986 jsem začal hledat možnosti, jak se co nejlevněji a hlavně bez problémů dostat do Polska. Žel, jak v Státní bance, tak i v cestovních kancelářích jsem dostal jen odpověď:

- a/ na pozvání přímých příbuzných potvrzené státními orgány PLR,
- b/ na služby zajištěné cestovními kancelářemi.

V této době již jednal Slovenský esperantský svaz s Esperanto-tourem v Bydgoszci a na jejich výzvu se přihlásilo dost zájemců nejen ze Slovenska, ale i z Čech. Této možnosti jsem se vyhnul z obavy, že nemám záruku, že dostanu kapesné a hlavně svolení k výjezdu do PLR, vzhledem k výše uvedené skutečnosti. Proto jsem podal objednávku na ČEDOK, který v kalendáři zahraničních zájezdů na rok 1987 uvedl nabídku zájezdu na kongres do Varšavy. Od doby podání objednávky, t.j. začátek října, až do března 1987 přes veškeré urgencye a žádost o odpověď na objednávku mi vždy v ČEDOKU řekli, že ORBIS dosud neodpověděl. Později jsem zjistil a kdo odbírá časopis Esperanto to může potvrdit, že teprve v únoru 1987 uzavřel kongresový výbor s Orbisem dohodu o ubytování účastníků kongresu. Příčina byla v tom, že koncem roku se musel na příkaz nadřazených orgánů vyměnit celý výbor Polského esp. svazu. Noví funkcionáři dostali nelehký úkol, a to stabilizovat vedení svazu a připravit světový kongres. Den před mírovým setkáním v Pardubicích jsem konečně dostal od ČEDOKU ceny za ubytování s tím, že zájemci o zájezd pojedou individuálně a že v ceně ubytování je započítaná snídaně. Ostatní si platí z kapesného. ČEDOK přislíbil, že zajistí i jízdenky, případně letenky, a jednou z podmínek objednávky bylo, že v ceně bude i kongresový poplatek. Neuplynuly ani dva dny, když ČEDOK oznámil zvýšení ceny za ubytování. Tuto skutečnost jsem oznámil všem zájemcům o zájezd, tedy nikdo neznal původní, první ceny. Asi za měsíc jsem dostal z ČEDOKU dopis, že ORBIS upravil ceny podle kursu rublu, tedy další zvýšení. Protože zájemci již měli podané objednávky podle oznámené ceny, ČEDOK jim poslal upozornění na zvýšené ceny za ubytování i kongresový poplatek. Někteří objednávky stornovali, jiní i za cenu jakoukolivůstali. I přes tuto nepříznivou situaci jsme na tom byli mnohem lépe než např. esperantisté v NDR, kteří ani v květnu neměli potvrzené služby od své cestovní kanceláře.

V dubnu jsem se zнову ptal ve státní bance na možnost získání kapesného do PLR. Odpověděli mi, že hodné lidí má pozvání od organizací v Polsku a že SBČS na tato pozvání dává kapesné, ale s poznámkou "s výhradou", tzn. že sice banka kapesné dá, ale záleží na hraničních orgánech PLR, zda na toto pozvání umožní vstup do PLR.

Tuto skutečnost také potvrdili esperantisté, kteří se zúčastnili kongresu železničářů v Katovicích. Dostali kapesné a jak po návratu řekli, na polské pohraničníky velmi zapůsobily kongresové karty. Žel, počet účastníků byl o polovičku menší než např. na kongrese v BLR v roce 1984. Důvodem byly vysoké ceny za ubytování v hotelích.

Shrnu-li celou zprávu, mohu říci, že jsem pro celou věc udělal maximum, ale jiná možnost nebyla. Neměl jsem záruku, že se na jakékoliv pozvání od kongresového výboru dostane každý do Varšavy. Stačí se také zamyslet nad tím, že od září 1986 se mohlo stát cokoli, např. uvolnění cesty do PLR, ale i omezení. Abych umožnil našim členům cestu do Varšavy, volil jsem tu možnost, která byla bez problémů, žel, další problémy přinesla s sebou v podobě cen za ubytování a za kongresový poplatek. Přes to věřím, že ti, co volili cestu přes ČEDOK, budou mít dobré vzpomínky z kongresu za kvalitní služby při ubytování.

Jar. Kašparec, tajemník

Niajn vicojn forlasis dumviva membro de ĈEA s-ano František F u č í k el Rouchovany (E-Klubo Třebíč). Li subite mortis la 7-an de marto 1987 post longa grava malsano en siaj 64 jaroj. Sian esperon en bona faro de Esperanto li esprimis per financa donaco al la Jubilea Fonduso. Li havis multegon da korespond-amikoj, el kiuj iuj vizitis lin. Esperanto-klubo en Třebíč perdis sian membron, sed li vivos en niaj koroj plu. (M. Štastný)

Kroužek esperanto při Domě kultury ROH Třineckých železáren oznamuje smutnou zprávu, že v krátké době zemřeli dva členové kroužku:

Gustav Němczyk, 74 let, byl dlouhým členem esperanta a aktivně pracoval. Pohřeb byl 2. června t.r.

Jan Pomykacz, 71 let. Dlouholetý člen kroužku již od jeho založení, dlouholetý předseda kroužku, dopisovatel do novin, spoluredaktor časopisu "Fajrero", který se po dobu tří let vydával v Jednotném kulturním středisku v Třinci, propagátor esperanta, šlechtný a nezištný pracovník. Pohřeb byl 10. června. (A. Milatová)

28. dubna zemřela členka klubu v Brně Marie HAVRÁNKOVÁ, vedoucí kroužku invalidů-esperantistů v Brně-Bohunicích. Byla zánícenou a velice čínerodou stoupenkyní esperantského hnutí a v tomto duchu také aktivizovala své okolí. Díle, které mezi invalidy započala, pokračuje.

3. června zemřel JUDr. Josef HŘIB, dlouholetý člen klubu v Brně a vědeckotechnické sekce ČES. Podílel se na odborné jazykové redakci Traxlerova česko-esperantského a esperantsko-českého právníckého slovníku, který je t. č. v tisku. (Bulteno Brno)

## interlingvistika seminario

Inter la 20-a ĝis la 24-a de majo 1987 okazis en Altaj Tatroj io eksterordinara, kio meritas atenton de ĉiuj cehoslovakaj esperantistoj. Okazis seminario sur scienca nivelo, kie partoprenis sep elstaraj cehoslovakaj lingvistoj (kompreneble neesperantistoj) kune kun ses lingvistoj-esperantistoj. Prelegis ankaŭ tri nelingvistoj, nome pri normigo de terminoj, pri problemoj en internaciaj fakaj renkontigoj kaj pri masintradukado. Ĉiuj prelegoj estis tuj tradukataj al la alia lingvo. Laboraj lingvoj estis Esperanto, la ceha kaj la slovaka. Eble pli bonan bildon pri la enhavo donos jena trarigardo de la prelegoj:

- d-ro D. Blanke, GDR, esperantisto: Pri la objekto kaj nuna stato de interlingvistika esploroj,

- s-ino W. Blanke, GDR, esperantistino, nelingvisto: Planlingvaj radikoj de internacia terminologia normigo kaj ties re-efiko sur Esperanton,
- d-ro T. Ejsmont, Pollando, esperantisto: Nova internacia lingva ordo,
- d-ro S. Kerman, esperantisto: Lingva konstruo por komuna komunikado,
- prof. d-ro J. Horecký, neesperantisto, membro de la Slovaka akademio de sciencoj: Rilato inter la lingvo kaj lingva komunumo en etnaj kaj planaj lingvoj,
- d-ro E. D. Krause, GDR, esperantisto: La evoluo de la leksiko de Esperanto kaj ĝia evoluigo - komparo inter la afiksara sistemo de Esperanto kaj la indonezia lingvo /bahasa indonesia/,
- prof. d-ro J. Mistrík, neesperantisto, membro de la Slovaka akademio de sciencoj /la ĉefa terminologo/: Esperanto kaj paralingvistiko,
- doc. d-ro V. Novobilský, CSc., esperantisto: Lingvaj problemoj en internaciaj fakaj renkontigoj,
- d-ro S. Ondrejovič, neesperantisto: Prozodiaj ecoj en la funkciado de la internaciaj etnaj kaj planaj lingvoj,
- Ing. J. Pospíšil, esperantisto: Utiligo de Esperanto en informaj komputoraj retoj,
- doc. d-ro P. Sgall + d-ro K. Oliva, neesperantistoj, profesoro kaj asistanto en katedro pri masintradukado de la Ĉeĥa alta lernejo teknika en Prago /komuna prelego, tamen d-ro Sgall ne venis, prelegis d-ro Oliva sola/: Masintradukado kaj interna pontolingvo,
- d-ro V. Skalička, neesperantisto: Esperanto kiel helplingvo,
- d-ro E. Spitz, esperantisto: Klasifikado de morfemoj en Esperanto kaj en etnaj lingvoj,
- prof. d-ro I. Szerdahelyi, Hungario, esperantisto /li ne povis pro labora trookupiteco veni, tamen teksto de la prelego estis al ĉiuj partoprenintoj liverita/: Esperanto estas vera lingvo,
- d-ro S. Utěšený, neesperantisto: Al la perspektivoj de la unueca tutmonda geografia nomenklature en Esperanto,
- d-ro P. Žigo, neesperantisto: Metalingva funkciado de Esperanto.

Ekde komenco regis bona etoso de kunlaboro kaj interkompreno. Ĉiuj neesperantistaj lingvistoj regis kelkajn lingvojn, kio ja ĉe lingvistoj kutimas, kaj do ili eĉ komprenis la originan parolon en Esperanto kaj ankaŭ do kontrolis atente korektecon de la tradukado kaj tujpretecon de la interpretistoj. Merkrede okazis bone organizita ekskurso al Pieniny, kie pluraj esperantistaj kaj neesperantistaj kolegoj amikiĝis. Ankaŭ en la koridoroj ili interparoladis, ankaŭ en la germana.

Por la tre bone organizita seminario, kiu celis eninteresiĝi niajn elstarajn lingvistojn pri interlingvistikaj kaj esperantologiaj-terminologiaj temoj, ni do devas kore danki la ĉefan organizinton, d-ron S. Košecký. Helpis finance kaj organize ankaŭ landaj asocioj. Kora danko estis esprimita ankaŭ al ĉiuj interpretistoj: E. Tvarožek, d-rino Barandovská, Ing. Werner, Ing. Pospíšil kaj J. Vondroušek. Certe oni sukcesis turni atenton de la generala lingvistiko en nia lando al interlingvistikaj kaj planlingvaj problemoj.

Ing. J. Pospíšil

STARTO - presorgano de Ĉeĥa Esperanto-Asocio, Jilská strato 10, CS-110 01 PRAGO 1, Ĉeĥoslovakio. Aperas 6-foje jare. Redakta komitato: Jiří Hanousek (grafika arango), Jaroslav Kašpárek, Miroslav Malovec, Jiří Patera (responda redaktoro) kaj Helena Štruncová. Presas OKP-6 Liberec. Transdonas al presejo 15. 8. 1987. Jarabono 24 CSK, por eksterlando 36 CSK aŭ 10,50 NLG, inkluzive de sendkostoj. Abonantoj turniĝu al niaj perantoj, al UEA aŭ rekte al nia asocio.

STARTO - nepravidelný věstník Českého esperantského svazu, Jilská 10, 110 01 PRAHA 1, vydáváný pro potřebu členů svazu. Vychází 6x ročně. Redakční rada: Jiří Hanousek (grafická úprava), Jaroslav Kašpárek, Miroslav Malovec, Jiří Patera (odpovědný redaktor) a Helena Štruncová. Povoleno odborem kultury NVP č. 3100083B5 ze dne 28. 3. 1985. Tiskne OKP-6 Liberec. Předáno do tisku 15. 8. 1987. Dohlédací pošta Praha 07. Snížený poplatek za poštovné povolán Ředitelstvem pošt Praha pod č.j. P/1-1267 ze dne 6. 4. 1979.



**TVAR**  
**v.d.**

**JÄGERMANNOVA 1682**  
**530 03 PARDUBICE**

● Je monopolním výrobcem sportovních ochranných přileb značky CASSIDA

● dále vyrábí drobné výrobky z plastických hmot určených pro domácnost a pánskou vycházkovou obuv

● provádí instalaci kovového těsnění do oken a dveří a to jak pro soukromníky tak i pro socialistický sektor

● provádí opravy hodinek, obuvi a provádí mandlování prádla

# KDS

## sedlčany

NOŽÍŘSKÉ VÝROBNÍ DRUŽSTVO \*

### MNOHO POTŘEBNÉHO PRO DOMÁCNOST

Kuchvňské nože v širokém výběru pro každý účel, různé soupravy dárkového charakteru včetně stolovacích souprav různých typů

Kuchvňské náčiní: vidličky, otvírače konzerv a korunkových uzávěrů, jehly na masové závítky, sekáčky a polo-sekáčky na maso apod.

Manikurní náčiní: zadržkové nůžky rovné i ohnuté v moderní tvarovém provedení, nehtové nůžky rovné i ohnuté, pilničky na nehty, malé manikurní soupravy

Pedikurní náčiní: kleště na nehty, štípky na kůžičku, rašplíčky na tvrdou kůži

Nůžky k různému účelu a v různém provedení

**Český esperantský svaz  
110 01 PRAHA 1, Jilská 10**

**NOVINY**



**Dohlédací pošta Praha 07**  
**Snížený poštovní poplatek povolen**  
**Ředitelstvím pošt Praha**  
**J. ZN. P/1-1267/79 ze dne 6. 4. 1979**